UNESKO
Kuriero
Aprilo-Junio 2024

Porjunulara literaturo: rakonto pri kresko kaj miro



- **Aŭstralio:** Pri aŭstraliaj fabeloj
- **Barato:** En Barato, famuloj prenas plumojn
- Nadia Essalmi, pioniro de porinfana eldonado en **Maroko**
- Kleraj influantoj en **Argentino**

NIA GASTO

Tiago Rodrigues, Portugala aktoro kaj reĝisoro: "La teatro estas la ideala loko por inventado de kolektiva memoro"

ISSN 2096-9082
06
9 772096 908249

中国青年出版总社 EL POPOLA ĈINIO
www.espero.com.cn
unesco

Abonu la presitan version en ĉiu trimonato aŭ abonu 100% senpage la bitversion.

Malkovru niajn ofertaĵojn

http://www.espero.com.cn/; http://esperanto.china.org.cn;
https://www.chinaesperantoligo.com.cn/kuriero//

Sekvu la lastajn novaĵojn de *Kuriero*

@unescocourier

Legu kaj disvastigu

Disvastigu kaj reklamu *UNESKO-Kurieron* laŭ Libera Aliro (*Open Access*), laŭ reguloj de UNESKO por publikaĵoj.

2024 • n-ro 2 • Eldonata ekde 1948

UNESKO-Kuriero estas eldonata kvarfoje jare, de la Organizajo de Unuiĝintaj Nacioj pri Edukado, Scienco kaj Kulturo (UNESKO). Ĝi antaŭenigas la idealojn de UNESKO, diskonigante ideojn pri inter nacie gravaj temoj, konforme al sia mandato.

Direktoro: Matthieu Guével

Ĉefredaktoro: Agnès Bardon

Asista redaktoro: Katerina Markelova

Sekcia redaktoro: Chen Xiaorong

Angla redaktoro kaj socia retejo: Anuliina Savolainen

REDAKTOROJ PRI LINGVOJ:
Angla: Gina Doubleday
Araba: Fathi Ben Haj Yahia
Ĉina: Chen Xiaorong kaj Ĉina Tradukejo kaj Eldonejo
Franca: Christine Herme (provlegado)
Hispana: Laura Berdejo
Rusa: UNESKO

Fotoj kaj ilustraĵoj: Danica Bijeljac

Kunordigado pri traduko: Hélène Menanteau

Administracia kaj redakcia asistanto: Carolina Rollán Ortega

Produktado:
Eric Frogé, Ĉefa Asistanto Pr oduktada

Fasonado: Delphine Chéret-Dogbo

Kovrila bildo: © Sylvie Serprix

Internulo : Wang Wenjin

Kuneldonaj redaktoroj

Esperanto: Chen Ji
Kataluna: Jean-Michel Armengol

Informo kaj Kopirajtoj:
courier@unesco.org
7, place de Fontenoy,

75352 Paris 07 SP, France

© UNESCO 2024

Danke al la grandanima apogo de Ĉina Popola Respubliko

Periodaĵo, alirebla en Libera Aliro (Open Access) sub la licenco Attribution ShareAlike 3.0 IGO (CC BY SA3.0 IGO) (*http://creativecommons.org/licenses/by-sa/3.0/igo/*). Uzante la enhavon de ĉi tiu eldonaĵo, la uzantoj devas observi la priuzajn kondiĉojn de UNESKO-Deponejo de Libera Aliro (Open Access Repository) (*http://en.unesco.org/open-access/*). La supra licenco koncernas ekskluzive la tekstojn. Por uzi la bildojn, oni devas peti permeson. La indikoj, uzitaj en tiu ĉi eldonaĵo, kaj la prezento de la donitaĵoj ne implicas esprimon de ia ajn opinio de flanke de UNESKO koncerne la leĝan staton de iu ajn lando, teritorio, urbo aŭ sfero de ties regado aŭ koncerne markadon de landlimoj. La artikoloj esprimas la opiniojn de la aŭtoroj, ne nepre reprezentas la opiniojn de UNESKO, kiu ne respondecas pri ili.

Malgarantio: UNESKO ne garantias la konformon de la Esperanto-eldonaĵo al la originala numero en la ses oficialaj lingvoj de la Organizo.

La bitversio haveblas senpage ĉe
http://www.espero.com.cn/
http://esperanto.china.org.cn/
http://uea.org/revuoj/unesko_kuriero

Supera organizo: Ĉina Internacia Komunika Grupo (ĈIKG)
Subtena organizo:
Universala Esperanto-Asocio
Eldono: El Popola Ĉinio
Prezidanto: Chen Wenge
Ĉefredaktoro: Zhao Jun
Vicprezidantoj: Wang Hanping kaj Yu Wen
Vicĉefredaktoro: Lin Chongzhen
Ĝenerala administristo: Zhao Quanyong
Aganta ĉefredaktoro: Chen Ji
Tradukantaro: El Popola Ĉinio kaj UEA-Teamo
Provlegantoj: Chen Ji, Mao Zifu, Rafael Henrique Zerbetto, Rob Moerbeek kaj José Antonio del Barrio
Presita de Limigita Kompanio Yincheng-Beichuang en Pekino
Kunlaboranto: Zaozhuang-a Universitato

Adr: P.O. Kesto 77, Beijing CN-100037, Ĉinio
Tel: +86-10-68996130
+86-10-68996590
Retpoŝto: lamondo@163.com
CN 10-1711/C ISSN 2096-9082
Prezo: 6.8 eŭroj

UNESKO Kuriero

Enhavo

4 LARĜA ANGULO

Porjunulara literaturo: rakonto pri kresko kaj miro

Infana kaj junulara literaturo, floranta ĝenro 5
Cath Pound

“Legi estas ankoraŭ unika sperto por infanoj” ... 8
Intervjuo kun Douglas Rushkoff

Pri aŭstraliaj fabeloj 10
Michelle J. Smith

Kiom grandajn dentojn vi havas: la lupo en la infanlibroj 12
Debra Mitts-Smith

Pasia eldonisto 16
Carolina Musa

Kleraj influantoj en Argentino 18
Natalia Páez

En Barato, famuloj prenas plumojn 20
Amrit Dhillon

“La kolizio inter teksto kaj bildo malfermas trian kampon de ebloj” 22
Intervjuo kun Delphine Perret

Ludejo inter vortoj kaj bildoj 25
Chrysogonus Siddha Malilang

Kio faras nin homaj 27
Cristina Puerta

Marisha Rasi-Koskinen, la ribelema plumo 30
Anuliina Savolainen

Nadia Essalmi, pioniro de porinfana eldonado en Maroko 32
Ghalia Kadiri

34 ZOMO

La mistero en la ordinara 34
Fotoj: Yishu Wang

44 NIA GASTO

“La teatro estas la ideala loko por inventado de kolektiva memoro” 44
Intervjuo kun Tiago Rodrigues

48 PLI DETALE

La efiko de milito sur scienca esplorado en Ukrainio 48

Ĉefartikolo

Infanoj ne plu legas. Adoleskantoj eĉ malpli. Ekranoj anstataŭas la bildstriojn kaj albumojn de nia pasinta infanaĝo. Tiel nuntempe oni paroladas.

En la realo, ĉu la malkontentuloj ŝatas tion aŭ ne, infana literaturo estas en bona stato. Kontraŭ ĉiu antaŭvido, libroj daŭre havas specialan lokon en la koroj de infanoj. Laŭtlegado restas speciala momento de kunesteco inter plenkreskuloj kaj infanoj. Kaj tio estas bona novaĵo, se konsideri kiom grava frua legado estas por ke oni lernu lingvon, venku timojn kaj komprenu la mondon. Eĉ adoleskantoj, kun siaj pasioj por romantikaj aferoj kaj heroaj fantazioj, estas feliĉaj plonĝi en dikan libron.

Dum pluraj jardekoj, la vigleco de infana literaturo estis subtenata de generacio de aŭtoroj kaj ilustristoj kiuj, de Ana Maria Machado (Brazilo) kaj Nahoko Uehashi (Japanio) al Maurice Sendak (Usono) kaj Tomi Ungerer (Francio), enspiris novan vivon en ĝenron, kiu estis, dum longa tempo, kaptita ene de instrua aŭ morala trudkitelo. La rezulto estas abunda kaj invento-riĉa gamo de libroj, kiuj parolas je infana nivelo. Ĉi tio ankaŭ estas konfirmita de la valoro kiel heredaĵo nun donita al tradiciaj fabeloj, kaj eĉ al la arĥivoj de iuj aŭtoroj kaj eldonejoj, kiaj estas tiuj de Père Castor, kiuj estis enskribitaj en la Registro de la Monda Memoro de UNESKO en 2017.

La kresko de infanlibroj ankaŭ povas esti mezurata per ilia ekonomia bonfarto. En 2023, la sektoro estis valora je preskaŭ 12 miliardoj da usonaj dolaroj tutmonde, kio igis ĝin grava eldon-agado en multaj landoj. Kaj ĉi tiu eksplodo ne estas nur pro la sukceso de iuj tutmondaj furorlibroj. Ĉie estas pasiaj eldonistoj produktantaj bonkvalitajn librojn, inkluzive en ne-ĉefaj lingvoj. La libro *Kio faras nin homaj*, kuneldonita de UNESKO kaj jam havebla en dudek unu versioj, bone ilustras ĉi tiun aliron.

Kaj tamen, malgraŭ sia ekonomia, simbola, eduka kaj kultura graveco, porinfana literaturo daŭre suferas de manko de rekono. Malgraŭ la sukcesoj, tre malmulta kritika spaco estas dediĉita al ĉi tiu ĝenro en la tradicia amaskomunikilaro. Ŝajnas ke verkado por infanoj restas – en la menso de multaj – negrava agado, eterna subĝenro.

Michel Tournier (Francio), la aŭtoro de *Vendredi ou la vie sauvage* (*Vendredo aŭ la sovaĝa vivo*), argumentis ĝuste male en la 1970-aj jaroj: “Tio signifas tre multe omaĝi infanojn, kiam oni konsentas, kiel mi faras, ke verko povas esti ĝusta por juna publiko nur se ĝi estas perfekta... La verkisto, kiu metas sian celon tiel alten, do montras ambicion nemezureblan”.

Kia pli alta ambicio povus ekzisti ol helpi infanon kreski? Kaj por plenkreskulo, kia pli granda ĝojo ol rekunligiĝi kun sia propra infanaĝo dum la tempo necesa por legi libron?

Agnès Bardon
Ĉefredaktoro

-El la angla esperantigis Renato Corsetti (Italio)



© Andrea Antinori
por UNESKO-Kuriero

Cath Pound
Sendependa prikultura ĵurnalisto

Porjunulara literaturo: rakonto pri kresko kaj miro

Estis necese atendi ĝis la dua duono de la 18-a jarcento por la ekapero de literaturo specife direktita al infanoj. Nuntempe, malgraŭ tio, ke la industrio de libroj por infanoj kaj junuloj estas en plena ekflorado kaj ke aŭtoroj kaj ilustristoj kreive konkuras por kreskigi la nombron de junaj legantoj, la porinfana literaturo devas ankoraŭ batali por esti agnoskita pro tio, kio ĝi estas: plenrajta literatura ĝenro.

La fakto, ke infanoj ankoraŭ estas fervoraj legantoj en nia pli kaj pli kreskanta cifereca epoko, povas surprizi tiujn, kiuj pensas ke junuloj estas konstante algluiĝintaj al siaj ekranoj. Vendoj de libroj por infanoj ja prosperas. Laŭ raporto de la brita merkatesplora firmao *Business Research Company*, la tutmonda merkato de porinfanaj kaj porjunulaj libroj ne ĉesis kreski en la lastaj jaroj kaj oni atendas ke ĝi kreskos de 11.76 miliardoj da usonaj dolaroj en 2023 al pli ol 12 miliardoj en 2024.

La grandega tutmonda populareco de la brita verkistino J.K. Rowling kaj ŝia libroserio pri *Harry Potter*, kaj ankaŭ de la brita verkisto Philip Pullman kaj lia fantazia libroserio *Liaj Mallumaj Materialoj*, ambaŭ komencitaj en la 1990-aj jaroj, estis la unua paŝo en novan renesancon de infanliteraturo. Dum la lastaj dudek jaroj, ni vidis vastan pligrandiĝon de la nombro de haveblaj verkoj, kiuj provizis infanojn per senprecedenta elekteblo de legaĵoj.

Tradiciaj rakontoj kaj plej bone vendataj historioj, kiel ekzemple *Charlie kaj la fabriko de ĉokolado* de Roald Dahl aŭ *Les Aventures du Petit Nicolas* (*La aventuroj de la eta Nikolao*) de René Goscinny (Francio), ankoraŭ estas tre popularaj. La samon oni povas diri pri ilustritaj klasikaj verkoj, kiel ekzemple *La tre malsata raŭpo* (1969) de la usona aŭtoro Eric Carle, pri manĝema raŭpo kiu sin nutras per serio da bele ilustritaj manĝaĵoj, paĝon post paĝo, antaŭ ol iĝi papilio, aŭ *Kie loĝas la sovaĝaj estaĵoj* (1963) de la usona aŭtoro Maurice Sendak. Sed dum la lastaj tri jardekoj, la oferto iĝis nekredeble diversa. Talentaj aŭtoroj aperis en multaj landoj, inter ili Ana Maria Machado (Brazilo) kaj Nahoko Uehashi (Japanio), ambaŭ gajnintoj de la prestiĝa premio Hans Christian Andersen. Tamen, nova generacio de inventemaj ilustristoj sekvas la spurojn de famaj verkistoj de infanliteraturo, kiel ekzemple Tomi Ungerer (Francio) kaj Bruno Munari (Italio), kaj ludas gravan rolon en la renovigo de la ĝenro.

> **“Pli kaj pli da libroj por adoleskuloj pritraktas ilian zorgon pri la medio**

En la aĝkategorio por junuloj kaj junaj plenkreskuloj, romanco, “romantazio“ (kombino de romanco kaj fantazio), krimo kaj suspensaj verkoj estas la plej bone vendataj. Ankaŭ la pliiĝo de la vendoj de aŭdlibroj helpas antaŭenpuŝi la merkaton. Raporto de Bookwire GmbH, provizanto de servoj por liverado de bitlibroj kies sidejo troviĝas en Germanio, menciis en 2023 ke la vendo de aŭdlibroj en Hispanio kaj Latin-Ameriko pliiĝis preskaŭ 52-procente inter 2021 kaj 2022.

La inventado de infanliteraturo

Konsiderante la hodiaŭan ĝeneralan popularecon de infanliteraturo, estas malfacile kredi, ke ĝi ekzistas nur de ĉirkaŭ 250 jaroj. Tion oni povas ekspliki per la fakto, ke infanoj estis rigardataj kiel “miniaturaj plenkreskuloj“ ĝis la dua duono de la 18-a jarcento. Sed post kiam ili estis rekonitaj kiel sendependaj estaĵoj,

laŭ la pensoj de filozofoj kiel John Locke kaj Jean-Jacques Rousseau, literaturo specife dediĉita al ili ekaperis, precipe en Britio, Usono kaj Skandinavio.

"En tiuj regionoj, la influo de la Protestanta Reformo, kiu instigis gepatrojn certiĝi, ke iliaj infanoj povosciu legi en sia denaska lingvo, ludis decidan rolon. Granda parto de la frua infanliteraturo celis la kuraĝigadon al kristanaj kompreno kaj valoroj," klarigas profesorino Karen Coats, direktoro de la Centro por Esplorado pri Infanliteraturo ĉe la Kembriĝa Universitato (Britio). Fakte, dum longa tempo porinfanaj libroj batalis por trabati al si sian vojon inter edukaj virtoj kaj moralaj imperativoj.

Malgraŭ tio, ke la 19-a jarcento vidis la eldonon de klasikaĵoj kiel *Alico en Mirlando* de Lewis Carroll kaj *La Aventuroj de Huckleberry Finn* de Mark Twain, infanliteraturo vere atingis sian propran identecon nur en la 20-a jarcento. Nova epoko por infanaj libroj komenciĝis kun la movado Arto-kaj-Metio, en Britio, kio estis la fundamento por tio, kio ankoraŭ faras la libron unika: la libereco de la aŭtoro rakonti rakonton, speciala atento al la rilato inter teksto kaj bildo, la graveco de koloro, kaj la aprezado de libro kiel objekto.



Aŭtoro kaj ilustristo Tove Jansson kun siaj estaĵoj, la Mumintroloj (Finnlando).

Mumintroloj kaj Pipi Ŝtrumpolonga

Nuntempe ekzistas multaj aliaj formoj de amuziĝo disponeblaj por infanoj, sed libroj ankoraŭ havas unikan valoron. "Legado estas al infanoj unu el la plej enprofundiĝaj, personaj manieroj por pasigi sian tempon – ili sentas sin liberaj por esplori la temon, kiu ilin fascinas, engaĝiĝi en riskoplenan aventuron, aŭ simple sin dediĉi al la plej absurda komedio. Kiam infanoj renkontas la ĝustan libron, la ligo estas profunda: oni rimarkas tion sur iliaj vizaĝoj ĉe multnombraj aŭtoraj eventoj," asertas Nick Campbell, komercisto de porinfanaj libroj ĉe librovendejoj Waterstones en Britio.

Ni ĉiuj scias, ke legado al antaŭlernejaj infanoj estas mirinda maniero konstrui vortprovizon, familiarigi ilin kun la skriba lingvo, nutri ilian junan imagpovon kaj doni al ili pozitivajn kaj eksterordinarajn heroojn, kun kiuj ili povas identiĝi. Ekde 1945, la finna verkistino Tove Jansson prezentis strangajn personojn kaj fortan inkluzivecon en siaj Mumintrolaj libroj, dum la ĉarmaj libroj pri Pipi Ŝtrumpolonga, de la sveda verkistino Astrid Lindgren, enkorpigas liberecon, originalecon, kaj inan forton. Pli lastatempe, la usona verkisto Todd Parr en sia libro *Enordas esti malsama* (2001) impulsas alireblan mesaĝon pri amo kaj akceptado al aliuloj.

Alfrontante la realon de la mondo ĉirkaŭ ili, adoleskantoj bezonas librojn, kiuj helpu ilin en ilia transiro al plenkreskeco. La gajninto de la Premio Burt 2018 por Kariba Literaturo por Junaj Plenkreskuloj, *La Mallumo de la Maro* de la gujana verkisto Imam Baksh esploras adoleskulan suferon tra fantazio.

Nerealaj atendoj de fizika perfekteco, morto aŭ rasismo estas ripetitaj temoj por tiu ĉi aĝogrupo. Ili estas enplektitaj en malutopiaj fikciaj titoloj, kiel *Malbeluloj* de la usona verkisto Scott Westerfeld aŭ *Nuloj kaj Krucoj* de la brita verkisto Malorie Blackman. Ilia pligrandiĝanta zorgo pri la medio ankaŭ estas pritraktata de verkistoj, precipe en la nordiaj landoj, kie aperis nova ĝenro pri malutopia klimata fikcio. La serio *Sangpluvo* de la sveda verkisto Mats Wahl kaj *Memoro de Akvo* de la finna verkisto Emmi Itäranta ambaŭ traktas la influon de homoj sur la medion.

> **"Legado al antaŭlernejaj infanoj estas mirinda maniero konstrui vortprovizon, familiarigi ilin kun la skriba lingvo kaj nutri ilian imagpovon**

Malgraŭ tio, ke tro longa restado de infanoj antaŭ ekrano ofte estas rigardata de gepatroj kiel malbona afero, *BookTok*, branĉo de *TikTok*, efektive stimulas amon al legado inter junaj plenkreskuloj. "Tio estas populara maniero por ricevi aŭtentikajn buŝ-al-buŝajn rekomendojn pri libroj, kaj ni regule vidas la efikon, kiun tiuj rekomendoj povas havi sur la mendadon de libroj," diras Campbell. "Niaj sekcioj por junuloj kaj junaj plenkreskuloj estas plenplenaj je junaj homoj entuziasme dezirantaj diskuti kun siaj amikoj pri la libroj, kiujn ili ŝatas."

Feliĉa fino

La fundamenta rolo de literaturo por infanoj en la helpado al ilia kresko malhelpis ke aliaj formoj de rakontado aŭ ekranoj ĵetu ombron sur ĝin. "Libroj ebligas al infanoj esplori danĝeron, alfronti malfacilajn verojn kaj trovi esperon en la fino de la rakontoj. Preskaŭ la tuta infanliteraturo pli karakterizigas per optimismaj finoj kaj malfermaj ebloj ol per barado de vojoj antaŭen. Espero ofte sidas en la ĉiutagaj veroj kaj en la lernado pri tio, ke per agoj eblas ŝanĝi la realon," eksplikas profesorino Vicky Macleroy, ĉefo de la Magistra Arta Programo pri Infanliteraturo ĉe la Londona Universitato Goldsmith en Britio, kaj specialisto pri porinfana literaturo.

Kaj tamen, malgraŭ la fakto, ke porjunulara literaturo estas floranta ĝenro kun furore vendataj libroj, apartaj premioj kaj dediĉitaj libro-foiroj, ĝi batalas por esti perceptata kiel "vera literatura ĝenro". La literaturaj ecoj de infanaj libroj estas ofte rigardataj kiel subordigitaj al ilia eduka valoro. Pro tiu manko de rekono, infanaj libroj malofte estas recenzataj en la ĉefaj amaskomunikiloj. "Ni daŭre kredas, ke porinfanaj libroj devas instrui lecionojn al infanoj kaj influi iliajn mondviziojn," asertas Karen Coats.

La Arkivoj de Père Castor en la *Memoro de la Mondo* de UNESKO

Roule-galette, Michka, Apoutsiak la malgranda neĝero kaj _Poule Rousse_ estas klasikaĵoj de la franca infanliteraturo. Ili ĉiuj apartenas al la kolekto de Père Castor, fondita en 1931 de la aŭtoro kaj eldonisto Paul Faucher ĉe la eldonejo Flammarion de Parizo, Francio.

Ĉi tiuj porinfanaj libroj, en kiuj kunlaboris rusaj, germanaj, polaj, ĉeĥaj, nederlandaj, svedaj, belgaj kaj francaj verkistoj, estas tradukitaj en pli ol dudek lingvojn. Ekde 2017, la arkivoj de Père Castor estas parto de la _Memoro de la Mondo_ de UNESKO.

La originaleco de tiuj porinfanaj libroj, kelkaj el ili inspiritaj de tradiciaj feaj rakontoj, kuŝas sur radikala ŝanĝo en la paĝaranĝo, ĉar unuafoje teksto kaj bildoj trovigas sampaĝe, kio faciligas ties legadon, ĉar la bildoj kompletigas la tekston.

Plejparte lokitaj en Meuzac, Haute-Vienne, en la centro de Francio, la arkivoj de Père Castor estis kolektitaj senĉese de Paul Faucher ĝis lia morto en 1967, kaj inkludas dokumentojn rilatajn al lia frua epoko kiel librovendisto, sed ĉefe al la konceptado, produktado kaj distribuado de la kolekto _Les albums du Père Castor_ (_La albumoj de Père Castor_) (1931-1967). La arkivoj enhavas notojn, unuajn eldonojn, originalajn desegnaĵojn, sonregistraĵojn, fotografiaĵojn kaj eĉ leterojn de infanoj al Père Castor.

La internacia Programo pri la Memoro de la Mondo kolektas dokumentajn heredaĵojn de internacia intereso kaj universala valoro, kiel ekzemple la taglibro de Anne Frank, afiŝoj de kubaj filmoj, manuskriptoj de la rusa verkisto Fjodor Dostojevskij kaj sondosieroj de tradicia ĉina muziko. La inkludo en la Registro montras la gravecon de tiu ĉi heredaĵo, kontribuas al pli vasta diskonigo de ĝiaj elementoj kaj ebligas facilan aliron al ĝi, simpligante ĝian konservadon por la estonteco.



© Astrid Lindgren Kompanio / Ingrid Vang Nyman

◥ Pipi Ŝtrumpolonga, *"la plej forta knabino en la mondo".*

"Tamen, – ŝi plu diras – porjunula literaturo povas esti traktata same kiel iu ajn alia literaturo: legata por ĝuo, studata kaj analizata laŭ siaj estetikaj ecoj, kritikata laŭ siaj gradoj de realismo kaj interpretata laŭ siaj simbolismo kaj ideologio." Se ni nur traktas ĉi tiun ĝenron kun la seriozeco, kiun ĝi meritas, kaj ne rigardas ĝin tra la prismo de niaj plenkreskulaj antaŭjuĝoj, tenante enmense la vortojn de la aŭtoro de *La Eta Princo*, Antoine de Saint-Exupéry: "Ĉiuj granduloj unue estis infanoj… sed malmultaj el ili memoras pri tio." ■

-El la angla esperantigis Pablo León (Argentino)

Anuliina Savolainen
UNESKO

Douglas Rushkoff: “Legi estas ankoraŭ unika sperto por infanoj”

“La sperto legi rakonton estas tre malsama, se oni estas mergita en libro aŭ trarulumas tekston sur ekrano,“ diras Douglas Rushkoff, usona amaskomunika teoriisto kaj iniciatinto de konceptoj kiel “virus-medio” kaj “ekran-junulo”.

Vi kreis la terminon “ekran-junulo” en via libro* Ludi la futuron: Kion ni povas lerni de ciferecaj infanoj en 1996. *Kiel la ekranoj fasonis novajn generaciojn?

Preskaŭ ĉiuj, kiuj legas ĉi tion, estas ia speco de ekran-junulo. Kiam mi estis infano, la televidilo kun katodradia tubo estis kiel tria gepatro en Usono, ĉar la plimulto de niaj gepatroj laboris aŭ estis okupataj. Vi venis hejmen kaj sidis antaŭ ĉi tiu “vitra panjo“ kaj tiel ricevis vian nutraĵon. Sed kiam mi kreis la terminon, mi celis homojn, kiuj estis edukitaj en la interaga medio: homojn por kiuj tajpi aŭ movi aĵojn sur la ekrano estis normale. Por mi la kulmino de la “ekran-junulo” estis kiam mi eniris vendejon de aparatoj en la mezo de la jaroj 2000-aj kun ĉiuj tiuj televidiloj kun grandaj ekranoj kaj vidis tri-kvar jaraĝan infanon aliri al la ekrano kaj provi froti fingron sur ĝin.

Kvankam nuntempe la ekranoj estas parto de la vivo de infanoj ekde tre juna aĝo, tamen la junula literaturo spertas senprecedencan furoron. Kiel vi klarigas tion?

Ĉi tio estas pozitiva signo. Legi librojn kreas alternativan cerbo-spacon; estas malsama sperto por multaj infanoj, ili eĉ spiras malsame dum legado. Laŭ la kanada teoriisto pri komunikado Marshall McLuhan, interagaj medioj ne kreas la saman sperton de enmergiĝo kiel libro. La libro estas varma medio, kiu liveras riĉajn informojn, kiuj ne postulas respondon; dum interaga medio estas malvarma medio en la senco, ke la mesaĝo ne estas kompleta kaj povas esti kompletigita de la leganto.

En Usono, ni havas preskaŭ neniajn publikajn spacojn por junuloj. La librovendejoj fariĝis lokoj, kie la infanoj povas ludi kaj distriĝi per libroj kiel ludiloj. La homoj de la libroindustrio estas lertaj pri merkatiko: de tuŝaj kaj palpeblaj libroj al ilustritaj romanoj; de mangaoj al Barbie-libroj... estas io por ĉiu emo kaj aĝo.

La cifereca teknologio ne superis la libron. Libro daŭre havas aŭtoron, kaj vi volas cedi vian aŭtonomion al ties aŭtoritato, por ke ĝi faru rakonton al vi. Ĉi tiu rakonta formo postulas linearecon. Kun skribita libro vi ankoraŭ estas en la lando de Aristotelo, kie vi havas rolon farantan elektojn kaj la leganto nerekte spertas ilin kiel neeviteblajn. Ĉio temas pri renverso kaj rekono.

Mi asertus, ke ĉiu amaskomunika medio donas okazojn por nutrado kaj pozitiva disvolvo, se vi uzas ĝin en taŭga loko je taŭga momento. Tio postulas kompreni la inklinojn de ĉiu medio. La libroj estas superaj por lineara rakontado. Interagaj medioj estas superaj por helpi homojn disvolvi potencon kaj konsideri

La biblioteko de Bezons en la ĉirkaŭaĵo de Parizo, Francio.



© Gilles Larvor / Agence VU


novajn vojojn. Sociaj retoj estas superaj, kiam uzataj en limigitaj kuntekstoj, por krei komunumojn.

Multaj adoleskantoj konsultas librojn unue informitinte pri ili ĉe sociaj retejoj aŭ per serio da programeroj. Kiu estas la aldonvaloro, kiun libro ankoraŭ povas alporti?

Oni bezonas ses horojn por legi unuhoran epizodon de la serio *Ludo de tronoj* en libro. Do, kial ili ankoraŭ ekprenas la libron? Estas interese, ke ili faras tion – ĉi-kaze la libro povas esti konsiderata kiel eniro al fanfikcio (amatora verkado ene de rondoj de fanoj surbaze de ekzistanta verko). La libro funkcias kiel etendiĝo al la serio, ĝi estas ilo por akiri aliajn perceptojn de la rakonto kaj de la roloj.

Fanfikcio havas por mi iom el la origina promeso de interaga kreivo. Kelkaj el la nuntempe plej bonaj furorlibroj unue komencis surrete kiel fanfikcio kaj la romanoj pri Harry Potter de J. K. Rowling inspiris sennombrajn fanfikciajn verkojn. Ĉi tiuj estas interagaj universoj. En la mondo de fantazia rolludado, la libroj pri Ublietoj kaj Drakoj ligitaj al la ludo estas alia ekzemplo de tiu fenomeno.

> **“Ĉiu amaskomunika medio proponas okazojn por nutrado kaj pozitiva disvolvo se vi uzas ĝin en taŭga loko je taŭga momento**




Ĉu vi vidas diferencon inter legi fizikan libron kaj legi ĝin surekrane?

Jes, kaj mi pensas, ke ankaŭ la infanoj konscias pri tio. Libroj estas parto de nia tridimensia orientado. Infanoj, kiuj iras al la librovendejo, marŝas al specifa angulo de la vendejo por vidi kaj tuŝi la librojn, kiujn ili memoras. Tio estas tre malsama sperto ol nur rulumi kaj esti nutrata per algoritmo.

Vi povas kompari tion kun havado de vinila disko kontraŭ uzado de muzikelsendflua servo. Kiam vi alvenas al la fino de la unua flanko de la albumo, vi inversigos ĝin por iri al la komenco de la dua. Sammaniere, vi estas space orientita kun libro. Vi memoras aferojn malsame.

Multaj homoj ankaŭ aŭskultas librojn, kio por mi ŝajnas pli taŭga uzado de cifereca teknologio ol legi ilin sur ekrano. Aŭdlibro povas krei pli da enmergiĝo: vi fermas viajn okulojn kaj sentas kvazaŭ vi povus esti tie.



Uzanto-interfaco kaj dezajnistoj de uzanto-sperto pliboniĝas por krei senton de spaco en enretaj spertoj. La “metaverso” supozeble estus bona por tio: loko kie homoj faras mondan kreadon, kaj anstataŭ nur krei senfinan tunelon, ili kreus lokon, najbarejon.

Ĉu la gepatroj devus maltrankviliĝi pri la influo de ekranoj sur siaj infanoj?

La gepatroj ĉiam devus maltrankviliĝi pri la uzado de io ajn. Ili devus maltrankviliĝi kiam ili permesas al sociretejaj kompanioj

> **“Legi fizikan libron estas tre malsama sperto ol nur rulumi**

havi ok horojn de la konscia tempo de iliaj gefiloj. Kiam ni vidas, ke junuloj estas deprimitaj kaj anksiaj kaj ke spite tion la grandaj teknologiaj kompanioj daŭre funkciigas siajn kompaniojn laŭ metodoj, kiuj antaŭenigas tiujn sentojn kaj kondiĉojn, tio maltrankviligas.

Mi opinias, ke ni devus pensi pri ĉiu nova medio, kiun vi alportas en ilian vivon, sammaniere kiel vi pensus pri tio alporti novan beston hejmen. Temas pri la kompreno de tio, al kio vi kuraĝigas, kiam vi donas novan ilon al la infano, kaj kiel vi partneras kun la junulo per tiu medio. Ne temas pri la ekranoj mem, sed pri tio kiu stiras kaj kio estas sugestita al infanoj per la inklinoj de la platformo. ■

-El la angla esperantigis Trefflé Mercier (Kanado)

Michelle J. Smith

Lektoro pri Literaturaj Studoj, Universitato Monash (Aŭstralio)

Pri aŭstraliaj fabeloj

La unuaj aŭstraliaj fabeloj transplantis al aŭstraliaj montoj malnovajn eŭropajn rakontojn, por familiarigi la gefilojn de kolonianoj al ilia nova medio.

Kvankam miskomprenataj kiel "universalaj" kaj "eternaj", tamen fabeloj profunde enradikiĝas en la valoroj de la epoko kaj loko en kiuj ili estas rakontitaj. Fruaj aŭstraliaj fabeloj ne formiĝis el daŭraj lokaj buŝaj aŭ literaturaj tradicioj kiel en Eŭropo, sed plej ofte estis verkitaj de blankhaŭtaj setlantoj, ĉar indiĝenaj popoloj estis translokitaj kaj spertis drastan ŝanĝon en vivmaniero. Tiuj literaturaj rakontoj priskribas la naturon de Aŭstralio, klarigas la lokan historion kaj estis utilaj por alkutimigi infanlegantojn kun lokaj flaŭro kaj faŭno.

La unuaj aŭstraliaj fabeloj estis rerakontoj de britaj kaj eŭropaj verkoj, kiuj estis transdonitaj en arbustajn aŭ dezertajn kuntekstojn. *La Tri Koaloj kaj Orbukla Knabino: Aŭstralia Fabelo* publikigita en la fruaj 1930-aj jaroj, estas unu el la plej rimarkindaj el tiuj rakontoj, ĉar ĝi estas bazita sur senmovaj fotoj de interagoj inter knabinaktorino kaj pluraj koaloj metitaj en enscenigitajn situaciojn. La fotoj estis faritaj de Cinesound, frua aŭstralia kinkompanio. La teksto transportas la leganton al epoko kiam "tri malgrandaj koaloj" vivis en arbusto manĝante gumfoliojn kaj trinkante "lakton el malgrandaj blankaj bovloj". Orbukla knabino loĝanta ĉe la arbusto formanĝis la manĝaĵon de la koaloj, sen la neallogaj gumfolioj. La fina paĝo de la libro inkluzivas informojn pri la karakterizoj kaj manĝaĵoj de "aŭstralia nacia dombesto". Ĉu pro la percepto, ke fabelo estas valora eduka ilo, ĉu pro la komunaj bildigoj de fabeloj kiel verkoj pri bestoj kaj arbaroj, koloniaj fabeloj ofte celas klarigi pri loka medio.



Serĉado de origino

Fabeloj el la Lando de Akacio (1904), de Olga Ernst, estas unu el pluraj fabelkolektoj kiuj provis per originaj rakontoj klarigi trajtojn de loka naturo. *La origino de Akacio* prezentas "rason de feoj, nomitaj 'La Infanoj de la Lago'" en la internaj regionoj de Aŭstralio ĉirkaŭantaj la Lagon Eyre en suda Aŭstralio. Hodiaŭ ĝi estas salakva lago, sed en la rakonto la areo iam estis "fruktodona kaj produktiva" antaŭ ol la ebenaĵoj iom post iom iĝis "dezertaj kaj senhomaj". La vivoj de la feoj, en risko perei pro la perdo de plantoj kaj bestoj, dependis de Oberono, la reĝo de la feaj triboj, kiu povas ŝanĝi ilian aspekton por savi ilin de la morto. La belaj feoj aspektas kiel "belaj oraj buloj" kiam ili flosas inter arboj kun siaj oraj haroj. Oberono ŝanĝis la feojn en semojn, kiuj estas disigitaj de birdoj en la Ŝtaton Viktorio dum arbarfajroj. La semoj kreske fariĝis akacioj, kaj la floroj de la ora akacio (*Acacia pycnantha*) iĝis ikoneca simbolo de Aŭstralio.

La figuroj de Oberono kaj nenomitaj blondaj feoj estas klara bildo de kiom fruaj aŭstraliaj fabeloj enkadrigis la medion tra la perspektivo de blankhaŭtaj setlantoj, specife tra la importo de karakteroj de britaj kaj eŭropaj tradicioj.

Kiu timas la timigan "bunyip"?

La priskribo de Ernst pri la feoj kiel "raso" loĝanta en la senindiĝena landinterno de Aŭstralio, estas tipa de la ĝenro dum la kolonia periodo. Aliflanke, *Butha kaj Bunyip: Aŭstralia Rugkufulineto* (1891), verkita de Mary Hannay Foott, estas unika, ĉar ĝi prezentas indiĝenajn rolulojn kaj ilian kuniĝon kun Country (indiĝena esprimo por la tero, al kiu ili estas ligitaj). La protagonisto de Foott estas la indiĝena knabino Butha, kiu vivas kun siaj gepatroj en regiono plena de bestoj por ĉasi, kiel ekzemple valabioj, bandikutoj kaj didelfoj. Dum nokta vojaĝo por alporti manĝaĵojn al sia avino, Butha malkovris sangospuron

> **"La blondaj feoj estas klara ilustraĵo pri tio, kiel la fruaj aŭstraliaj fabeloj enkadrigis la medion tra la perspektivo de blankulaj setlantoj**

post la spuroj de viro kaj poste malkovris la kialon de lia vundo: "bunyip". Ĉi estaĵo, kiu ludas la rolon de lupo, originas en la mitologio de indiĝenoj: "bunyip" estas amfibio timata pro predado de bestoj kaj infanoj, ĝi troviĝas proksime de lagoj, riveroj, akvotruoj aŭ senflua akvejo.

La protagonisto de Foott similas variantojn de Ruĝkufulineto en kiuj la knabino estas trompisto kiu povas superruzi la lupon: Butha trankviligas la malsatan kaj timigan "bunyip" kun sia "long-serpenta beko", proponante al li diversajn manĝaĵojn el sia sako. En tiama kultura etoso, indiĝenoj estis rigardataj kiel bezonantaj "protekton" kaj modernecon alportataj de blankuloj, kaj "Butha kaj 'Bunyip'" transprenis la konatan rakonton pri postvivado spite al la danĝeroj de eŭropaj arbaroj al la arbustoj de Aŭstralio, kaj popularigis la metodojn de lokaj indiĝenoj por akirado de abundaj resursoj el la tero, sur kiu ili vivis.


> **De la 1930-aj jaroj, aŭstraliaj aŭtoroj komencis verki siajn proprajn originalajn fantaziajn rakontojn surbaze de lokaj elementoj**

Homaspekta koalo

Eŭropaj rakontotradicioj estis transplantitaj sur novan grundon en Aŭstralio dum la kolonia periodo, kaj dum ĉirkaŭ kvardek jaroj, aŭstraliaj verkintoj kultivis eksplicitajn rilatojn inter medio, nacia identeco kaj fabeloj por infanoj. Tamen tia aŭstralia porinfana fabeltradicio estis relative mallongdaŭra fenomeno, kiu plejparte malaperis en la 1930-aj jaroj. Ekde tiam, anstataŭ alpreni importitajn fabelojn kaj rakontojn kiel modelon, aŭstraliaj aŭtoroj elektis krei siajn proprajn originalajn fantaziajn rakontojn surbaze de lokaj elementoj, kiel ekzemple la libroserio *Snugglepot* kaj *Cuddlepie*, de May Gibbs, pri la "gumnutbeboj" (1918) kaj la libroserio *Palpebrumema Bill* de Dorothy Wall, kiu havas homaspektan koalon kiel ĉefrolulo kaj komenciĝis en 1933).

Nuntempe, aŭstraliaj verkistoj por plenkreskuloj kaj infanoj denove lernas de fabela tradicio en sia fikcio, inkluzive de Kate Forsyth kaj Margo Lanagan. Unu rimarkinda diferenco estas, ke la voĉoj de la indiĝenoj nun estas videblaj en la ĝenro, kiel ekzemple la romano *La Cigna Libro* (2013) de Alexis Wright: en mondofina estonteco, indiĝena junulino estis trovita en eŭkalipto, muta kaj senmemora, dek jarojn post kiam ŝi malaperis. Jen kiom malproksima ĝi estas de la orharaj feoj de la fruaj fabeloj de Aŭstralio! ■





Public domain

◥ *Librokovrilo de* La Tri Koaloj kaj Orbukla Knabino: Aŭstralia Fabelo, *ĉ. 1930.*

-El la angla kaj ĉina esperantigis Xie Ruifeng (Ĉinio)

Kiom grandajn dentojn vi havas: la lupo en la infanlibroj

Dum longa tempo la lupo estis la plej granda fiulo en tradiciaj rakontoj, metaforo de sovaĝeco kaj perfido. Dum ĝi iom post iom malaperis en arbaroj, ĝia statuso kaj bildo en infanliteraturo evoluis – ĝis la nuna punkto, kiam ĝi estas foje bildigita kiel amiko de infanoj.

Debra Mitts-Smith

Verkisto, emerita profesoro kaj fakulo pri porinfana kaj porjunula literaturo, Mitts-Smith doktoriĝis pri Bibliotekaj Sciencoj ĉe la Universitato de Illinois en Urbana-Champaign, Usono. Ŝi estas regula kontribuanto de la revuo Internacia Lupo *kaj aŭtoro de* Bildigo de Lupo en Infanliteraturo *(2010).*

Malfermu multajn infanlibrojn kaj vi trovos lupojn kun kufoj, altaj ĉapeloj kaj supertutoj. Kelkaj ŝajnas pli similaj al homoj ol lupoj, dum aliaj ŝajnas pli similaj al lupoj ol homoj. Kaj dum la plejparto ludas la ricevitan rolon, aliaj ribelas kaj insistas rakonti sian version de la rakonto.



Ĉu ĉe vojkruciĝo, pordo, paŝtejoj aŭ bienoj, la lupo de infanlibroj estis antaŭ ĉio predanto. En rakontoj celantaj instrui prudenton kiaj estas *Ruĝkufulineto*, *La tri porketoj* kaj *La lupo kaj la sep kapridoj*, same kiel en multaj el la fabloj de Ezopo el antikva Grekio, la lupa predado estis metaforo por danĝeraj homoj kaj danĝera homa konduto. La celoj de la lupo (la malfortuloj, la junuloj kaj la malsanuloj) kaj taktikoj (flirtado, trompo kaj minacoj) igas ĝin perfida, malmorala kaj inda je puno.

Sed la lupo estas ankaŭ reala besto, granda viandmanĝanta besto kiu iam estis kutima en la norda hemisfero. Por eŭropanoj kaj eŭrop-amerikanoj, la reala lupo estis minaco por homoj kaj iliaj bestoj, donante kredindecon al aliaj timoj kaj helpante svagigi la liniojn inter realo kaj simbolo.

La rakonto de Ruĝkufulineto, knabineto kiu renkontas lupon dum ŝi survojas por viziti sian avinon, meritas specialan atenton. Variaĵoj de ĉi tiu rakonto estis trovitaj tra Eŭropo, Azio kaj Nord-Ameriko. La versioj kiuj troviĝas en infanlibroj baziĝas ĉefe sur du fontoj: la kolekto de Charles Perrault, de 1697, enhavanta buŝajn francajn popolajn fabelojn, kaj la kolekto de la fratoj Grimm de la 19-a jarcento enhavanta germanajn fabelojn. La versio de Perrault finiĝas per la vorado, fare de la lupo, de la avino kaj la knabineto, dum en la versio de la fratoj Grimm, ĉasisto mortigas la lupon kaj savas la avinon kaj la nepinon el la ventro de la lupo. *Lon Po Po: Rakonto el Ĉinio* (1989) de la ĉin-usona ilustristo Ed Young enkondukis ĉinan version, en kiu tri junaj fratinoj superruzas la lupon.

→

> **“Variaĵoj de Ruĝkufulineto estis trovitaj tra Eŭropo, Azio kaj Nord-Ameriko**

© Éditions du Rouergue, 2021



◥ *Kovrila ilustraĵo de* Ne la ombro de Lupo *de Natali Fortier (Kanado/Francio).*

Nova lupo en la vilaĝo

Ĉirkaŭ la fino de la jaroj 1800, kiam la streboj elradikigi lupojn en la okcidenta parto de Usono ekhavis sukceson, pluraj infanrakontoj prezentantaj lupojn en pli kompatema lumo estis publikigitaj. Ĉi tiuj inkludis la mallongan rakonton *Lobo, la reĝo de Curramaw* (1898) de la kanada verkisto kaj ilustristo Ernest Thompson Seton kaj la verkojn *La voko de sovaĝejo* (1903) kaj *Blanka Dentego* (1906) de la usona romanisto Jack London. Kvankam la lupoj de ĉi tiuj rakontoj ne estis realismaj, ili estis admirindaj.

Profundaj ŝanĝoj en la priskribo de la lupo en okcidentaj infanlibroj tamen ne okazis ĝis la dua duono de la dudeka jarcento. Pluraj faktoroj, inkluzive la komencon de sciencaj studoj pri la lupo, ĝian preskaŭan estingiĝon kaj ŝanĝon en la leĝa statuso de la lupo, de specio ĉasata al protektata, helpis kontribui al la pliiĝo de popularaj libroj favoraj al la lupo.

La disvastigo de informoj pri realaj lupoj kondukis al pli nuancitaj bildoj de lupoj en fikciaj kaj nefikciaj verkoj. Ĉi tiuj ne neas la predadon de la lupo, sed anstataŭe reduktas ĝin al trajto inter multaj aliaj de la socia besto kiu ludas kernan rolon en la ekosistemo.

En *Vizaĝo al vizaĝo kun lupoj* (2008), la usona verkisto kaj fotisto Jim Brandenburg fokusas sian atenton sur la vivo en luparo, substrekante la similecojn inter la vivoj de lupidoj kaj tiuj de infanoj. La fikcia biografio *Lupo nomata Wander* (2019) de Roseanne Parry rakontas la vivon de reala lupo kiu vojaĝis pli ol 1600 kilometrojn serĉe de partnero, dum la libro *Kiam la lupoj revenis* (2008) de la usona verkisto Dorothy Hinshaw Patent montras kio okazas kiam la lupoj revenas al siaj praaj habitatoj.

Dum la solecaj lupoj de tradiciaj rakontoj prezentas minacon, tiuj de nuntempaj nefikcio kaj realisma fikcio estas vundeblaj, ne minacaj. Surbaze de sciencaj studoj de lupoj, tiuj verkoj redifinas kion signifas esti predanto, fokusiĝante pri la danĝeroj kaj la defioj kiujn lupoj alfrontas.



© Sara / Foto: BnF. CNLJ, Département littérature et art

Kovrila ilustraĵo de La lupo *de Sara, Eldono Thierry Magnier (Francio), 2000.*

> **La preskaŭa estingiĝo de la lupo kontribuis al la pliiĝo de popularaj libroj favoraj al la lupo**

De lupaj infanoj al homlupoj

Du motivoj ligitaj al la lupo kiuj iĝis fonto de inspiro por verkistoj kaj ilustristoj de infanlibroj, estas la infanoj kreskigitaj de lupoj kaj la homlupoj. Tiuj rakontoj reverkas ne nur la lupon, sed ankaŭ la rilaton de la lupo kun junuloj.

La angla verkisto Rudyard Kipling malfermas *La ĝangalaj libroj* (1894-95) per la savo de la bebo Mowgli fare de luparo. En la romano *Julie de la lupoj* (1972) de la usona verkisto Jean Craighead George, luparo savas la junan ĉefrolulon de danĝeraj homoj.

Aliaj rakontoj, kiel *Rakonto de lupo* (1981) de la usona verkisto David McPhail, prezentas infanojn kiuj savas lupon. Kaj en *La lupo en neĝo* (2017) de la usona ilustristo Matthew Cordell, la savado estas reciproka: knabino savas lupidon kaj estas siavice savita de ĝia luparo.

Formŝanĝantoj aŭ homoj kiuj iĝas lupoj troveblas tra multaj kulturoj kaj portas diversajn signifojn. Verkistoj de japanaj mangaoj ofte uzas formŝanĝantojn por esplori la homan konekton kun naturo kaj genraj roloj.

Kontraste, en okcidentaj infanlibroj, la lupa formo iĝas la maniero per kiu infanaj roluloj povas esprimi sin, kio igas ilin la plej ferocaj fikciaj lupoj. En la libro *Kie estas la sovaĝaj aĵoj* (1963) de la usona verkisto kaj ilustristo Maurice Sendak, knabo nomita Max surmetas lupan kostumon kaj liberigas sian enan beston, dum Ulysses en la libro *La Masko* (*Le Masque*) (2001) de la franca verkisto kaj ilustristo Grégoire Solotareff portas la felon de lupo por protekti infanojn de homaj predantoj.

La rakontoj pri lupoj ankaŭ estas bonaj por parodioj. En la libro *La vera rakonto de la tri porketoj de L. Lupo* (1989) de la usonaj verkisto Jon Scieszka kaj ilustristo Lane Smith, la lupo asertas esti

> **Formŝanĝantoj aŭ homoj kiuj iĝas lupoj troveblas tra multaj kulturoj**

viktimo de miskompreno kaj klarigas siajn renkontiĝojn kun la tri porketoj. Uzante tradiciajn rakontojn pri la lupo kaj aliaj bestoj de tiuj rakontoj, la franca verkisto kaj ilustristo Geoffroy de Pennart kreis parodiojn kiel *Ruĝa ronda ĉapelo* (*Chapeau Rond Rouge*) (2005), kiuj modernigas la tradiciajn rakontojn, emfazas humuron super moralaj lecionoj kaj reverkas la lupon. ■

La plej granda biblioteko por infanoj troviĝas en Munkeno

Lokita en kastelo de la 15-a jarcento en Munkeno, Germanio, la biblioteko Internationale Jugendbibliothek estas pli ol biblioteko: ĝi estas festivalo de skribita vorto, prezentanta plenan kalendaron de eventoj kaj viglan gamon de ekspozicioj, atelieroj kaj koncertoj.

Komencita en 1949 kaj renovigita freŝdate, ĝi estas la plej granda biblioteko de porinfana literaturo en la mondo. Ĝi estas hejmo de 27 000 libroj en pli ol 24 lingvoj, kiuj povas esti pruntepreneataj senpage. La stoko estas konstante ĝisdatigita kaj novaj kaj premiitaj libroj ĉiam troviĝas en ĝi.

Kreita post la fino de la Dua Mondmilito, la biblioteko rekonas literaturon por infanoj kaj junuloj kiel kernan por la kultura vivo de socio. Ĝia fondinto, Jella Lepman, verkisto de libroj por infanoj kaj ĵurnalisto kiu estis ekzilita al Britio dum la Dua Mondmilito, sekvis la mision, je sia reveno en Germanion, helpi infanojn traŭmatizitajn de la milito. Ŝia maniero helpi ilin estis antaŭenigi kulturan alfabetigon por infanoj kaj junuloj.

Krom pruntedoni librojn, ĉi tiu institucio provizas vastan gamon de kulturaj aktivaĵoj inkluzive de legadoj, diskutrondoj kaj konferencoj, kaj cetere internacian literaturan festivalon. Freŝdate ĝi prezentis al familioj ekspozicion de bestaj ilustraĵoj de rakontoj el Tanzanio, koncerton por infanoj fare de la Bavara Radia Simfonia Orkestro bazitan sur populara infanlibro kaj legadon fare de la german-niĝeria verkisto Efua Traoré. Edukaj projektoj permesas al junuloj enprofundiĝi en gravajn temojn: tutsemajna esplorado pri la efikoj de librobrulado kulminas per teatra spektaklo.

Sepdek kvin jarojn post sia fondiĝo, *Internationale Jugendbibliothek* fiere estas loka centro por infana edukado kaj libertempaj aktivaĵoj kaj samtempe senegala internacia provizejo de infanliteraturo.



◥ *Ilustraĵo de* La Sentemtala Lupo *de Geoffrey de Pennart (Francio).*

© 1998, Kaléidoscope, Parizo

-El la angla esperantigis Manuela Burghelea (Belgio)

Carolina Musa

Sendependa eldonisto de Libros Silvestres

Carolina Musa: Pasia eldonisto

Kial permesi, ke la manko de papero kaj rapidiĝanta inflacio haltigu la libroeldonadon? La sendependa eldonisto *Libros Silvestres* (*Sovaĝaj Libroj*) daŭre defias ĉiujn malfacilaĵojn ekde la fondiĝo antaŭ dek jaroj. Kio estas ilia sekreto? La neŝancelebla decidemo kaj sufiĉe granda kreemo de la manaĝera estrino Carolina Musa.

Ekde la momento kiam mi kapablis legi, mi estis fascinita de vortoj. Mi verkis mian unuan poemon kiam mi estis dekjara, kaj ekde tiam, mi neniam ĉesis verki. La ideo estigi eldonejon unue venis al mia kapo kiel maniero publikigi miajn proprajn librojn. Mi gvidis seminariojn por instrui verkadon al infanoj kaj por krei lignajn pupojn kiam mi malkovris la teknikon de la faldofiguraj libroj. Tio ŝanĝis mian vivon, permesante al mi kombini kelkajn el miaj pasioj.

Mi rimarkis, ke animacio bildigas la vortojn. Do, mi provis fari tridimensiajn librojn uzante formojn desegnitajn de mia amikino Laura Oriato. Tiel la unuaj du eldonoj estiĝis: *Caserío* (*La Vilaĝeto*) en 2014, kaj *Cabeza de flor* (*Korolo*), en 2015. Ni presis po 50 ekzempleroj, kunmetante ilin mane, paĝon post paĝo. Ili estis tiel sukcesaj, ke ni decidis plivastigi nian produktadon. Dek jarojn post la fondiĝo, nia eldonejo ankoraŭ ekzistas, en Rosario, proksimume 300 kilometrojn nordokcidente de Bonaero, kun katalogo de 56 titoloj. Mi publikigas fikcion kaj literaturon, ĉefe por infanoj. Mi ŝatas ilustritajn librojn kaj mi ĉiam bedaŭris, ke libroj por plenkreskuloj ne havas bildojn, ĉar bildoj ebligas alian nivelon de legado.

> **“Mi bonŝancas, ĉar mi sukcesas nur eldoni tion, pri kio mi sentas pasion**

Mi ankaŭ havas apartan emon al libro-objektoj kiuj malfermiĝas en nekutimaj manieroj, ebligas interagajn vojaĝojn, ludas per volumenoj kaj animacioj, kaj legeblas de malsupro supren. Mi amuziĝas per disvolvado de tiuj ĉi ideoj en la kolekto *Una cosa maravillosa* (*Mirinda aĵo*). Ni presis pli ol 20 mil ekzemplerojn de la eltranĉebla libro *Fábrica de escalofríos* (laŭlitere, *Fabriko de febra ekscitiĝo*) kiu povas esti uzata por krei dek milionojn da poemoj.



Imagi eblajn librojn

Alia ekzemplo estas la serio *¿Qué es? ¿Dónde está?* (*Kio ĝi estas? Kie ĝi estas?*), kiu proponas *Cien cosas para buscar y encontrar* (*Cent aĵoj por serĉi kaj trovi*) en malgranda formato kun paperfaldaĵoj. Estas ankaŭ alia kategorio de libroj kiujn mi nomas “literaturaj artefaktoj”, kiuj ne estas libroj en la strikta senco de la termino, sed kiuj tamen kunportos vin al literatura aventuro, kiel *Los cuentos de Juanito Conejo* (*La Fabeloj de Joĉjo, la kuniklo*), aro da rakonto-kartoj kaj aliaj ludformatoj. Mi bonŝancas, ĉar mi sukcesas eldoni nur tion, pri kio mi sentas pasion, alivorte, tekstojn kiuj tuŝas mian koron. Kiam mi legas tekston, mi devas imagi la libron. Por mi, tio estas la ĉefa funkcio de eldonisto – imagi, kiel povus esti la libro. Mi pasigas horojn rigardante ilustraĵojn, reviziante la laboron de



bildartistoj, ĝis mi trovas tiun, kiu povas gvidi la libron en certan direkton.

Okazas kelkfoje ke mi multe admiras artiston kaj tiam atendas (aktive, atente kaj observeme) tekston, kiu kongruas kun ilia bildo de la universo. Eldonado signifas ankaŭ fari justecon al indaj tekstoj kaj al talentaj verkintoj, kiel Daniel Moyano, Nancy Bacelo kaj Luisa Futoransky, kiuj estas en nia katalogo, konstruante pontojn por la novaj generacioj.

Mankas papero

Jen estas la revo. Sed la realo estas tute alia afero. Subteni eldonan programon en Argentino estas konstanta defio. La ekonomia krizo kaj inflacio altigas la prezon de krudaĵoj, sekve la presadajn kostojn, kiuj senĉese altiĝas. Argentino ne produktas sufiĉe da papero por kontentigi la bezonojn de loka industrio kaj ne ekzistas taŭgaj kondiĉoj por importi ĝin, kio rezultigas mankon de tiu ĉi ŝlosila rimedo. Kaj la abunda mendado ankoraŭ plie premas la presadkostojn. En tiu ĉi kunteksto, estas malfacile ne cedi al certaj redakciaj kaj estetikaj elektoj.

El tiu kresko de kostoj rezultas ankaŭ en prezaltiĝo de niaj libroj, kiuj jam estas multekostaj. Ĉi tio prezentas al ni, kiel eldonistoj, veran provon de konscienco. Ĉu ni eldonas nur por elito? Ĉu tio efikas kontraŭe al la emancipa alvokiĝo de la libroj?

Laŭ mia vidpunkto, la granda defio por eldonejoj en Argentino, kaj eble en la Sudo ĝenerale, estas povi evoluigi projektojn dum oni reinventas formojn de produktado kaj distribuado.

Fari multon per malmulto

Konsiderante ĉion ĉi, ni devas redifini niajn ligojn kun presejoj, ekzemple forĝante partnerecojn kun presistoj por iom mildigi la produktokostojn. Ni ankaŭ havas nian propran grafikan studion kie ni faras multon de la muntado kaj enpaĝiga laboro. Ĉar ni havas nur malgrandajn eldonkvantojn – kutime 500 ekzemplerojn – tio donas al ni pli grandan flekseblecon kaj permesas al ni represi nur la plej bone vendatajn titolojn.

Alia strategio estas "antaŭvendi" niajn eldonaĵojn – kun granda rabato – al fidelaj legantoj. Ni ankaŭ havas niajn proprajn vendejojn ene de reto de etaj kaj mezgrandaj sendependaj librovendejoj, kiuj elektas tre zorgeme siajn stokojn. Ni ankaŭ ofertas aranĝojn en lernejoj, lokaj bibliotekoj kaj verkistaj laborrenkontiĝoj, por estigi ligilojn inter aŭtoroj kaj legantoj.

Kaj, kompreneble, ni partoprenas en librofoiroj ĉie en la lando, kaj ni starigis specifajn projektojn kun naciaj kaj eksterlandaj institucioj. Por rekuperi nian komencan investon, ni devas organizi eventojn kiam ĉiu libro estas publikigita.

Onidire en ĉiu krizo estas oportuno, ĉar ĝi devigas vin fari multon el malmulto aŭ preskaŭ nenio. Ĉiuokaze, kiaj ajn la obstakloj trapasotaj estas, mi ne povas vidi min vivanta en mondo kie mi ne faras librojn, legas librojn kaj dividas la pasion kiun ili inspiras en mi. ■

> **"Subteni eldonan programon en Argentino estas konstanta defio**

-El la angla kaj hispana esperantigis Orlando E. Raola (Usono)



Natalia Páez

Ĵurnalistino en Bonaero, Argentino

Kleraj influantoj en Argentino

Sekvataj de miloj da junaj legantoj, literaturaj influantoj fariĝis ĉefroluloj en eldonado por adoleskantoj, dividante siajn plej ŝatatajn legaĵojn sur sociaj retejoj.



© Boris Séméniako por UNESKO-Kuriero

En 2014, kiam James Dashner, aŭtoro de la populara trilogio *Labirinto*, alvenis al la fama Internacia Libro-foiro de Bonaero (FIL), li estis akceptita kiel rokstelulo. Kun libroj enmane, centoj da junaj fanoj atendantaj lin preskaŭ kaŭzis tumulton.

La loko rezervita por subskribado de libroj montriĝis tro malgranda, kun atendovicoj etendiĝantaj ĝis la strato – la lastaj homoj foriris je la 2-a matene. Laŭ la organizantoj de la foiro, nenio kiel ĉi tio estis vidita depost la vizito de Ray Bradbury, usona aŭtoro de sciencfikcio, en 1997. Sed ĉi-foje estis aŭtoro de infanlibroj, kiu kaŭzis la tumulton.

La plej ŝatataj

Post dek jaroj, plifortigita de sociaj retejoj, la pasio pri poradoleskanta fikcio montras neniun signon malaperi. Estas fakte la malo. Al ĉi tiu sukceso multe kontribuas literaturaj influantoj, kiuj dividas siajn plej ŝatatajn librojn sur la plej popularaj platformoj. Estas preskaŭ 4 000 tiaj "libro-influantoj" en Argentino, multaj el ili junuloj, kun grandnombra sekvantaro.

Victoria Resco, ekzemple, estas nur 21-jaraĝa kaj havas pli ol 1.4 milionojn da sekvantoj en sia TikTok-konto, dum ŝiaj afiŝoj povas ricevi ĝis 58,4 milionojn

da ŝatoj. Ŝia unua afiŝo datiĝas de la pandemio, en julio 2020, kiam ŝi estis nur 17-jaraĝa. Ekde tiam, ŝi fariĝis sukcesa aŭtoro post la eldonado de *Reino de papel* (*Papera regno*), libro kiun, kompreneble, ŝi diskonigis sur sia konto. "Nuntempe, ĉiu aŭtoro devas partopreni en sociaj retejoj", diras ŝi.

Eldonistoj rapide komprenis la valoron de tiuj junaj kritikistoj kun iliaj longaj listoj de subtenantoj. "Kiam ili eldonas novan libron, ili kutime petas, ke ni diskonigu pri ĝi", konfirmas Victoria Resco. La eldonistoj mem agnoskas, ke la sociaj retejoj ŝanĝis paradigmojn. "La kradvorto *#booktok*, kiu havas pli ol kvin miliardojn da vidoj, revoluciis la sektoron pri eldonado. Ĉe Penguin Random House ni laboras kun influantoj, kies recenzoj furoras", klarigas Sara D'Angelo, estrino pri merkatiko ĉe tiu usona eldonejo.

De virtuala al vera influo

La kresko de literaturaj influantoj ankaŭ instigis la Bonaeran Libro-foiron starigi komisionon por junulaj aktivaĵoj, kiuj inkluzivas reprezentantojn el eldonejoj kaj libroinfluantojn. En 2015, Movida Juvenil (la junulara programo de la Foiro) organizis sian unuan Kunvenon de Internaciaj Prilibraj Influantoj.

"La fenomeno ekis sur sociaj retejoj kaj nun iris de virtuala mondo al libro-foiro kaj eldonistoj, kiuj nun dungas aŭ kunlaboras kun ĉi tiuj junuloj. Tio montras ne nur, ke librokulturo ne mortis, sed ankaŭ, ke junuloj estas tiuj, kiuj tenas ĝin vivanta", diras Ezequiel Martínez, direktoro de FIL en Bonaero.

Tio, kio ekis kiel grupo de blogantoj, nun estas kreskanta fadeno de ciferecaj kreantoj de enhavoj. Multaj el la influantoj estis konsultitaj de eldonistoj de porjunulaj libroj, kaj kelkaj nun estras kolektojn por junaj legantoj.

Melisa Corbetto, konata kiel "Meli", estas unu el tiuj entuziasmuloj, kiu, ekde sia 16-a jaraĝo, diskonigas pri siaj plej ŝatataj aŭtoroj enrete kaj poste antaŭ kameraoj ĉe *Instagram*.

Ŝi poste translokiĝis al la alia flanko de la ekrano kaj aliĝis al eldonejo.



Nun, 33-jaraĝa, ŝi estas direktoro pri eldonado de V&RYA (la junulara kolekto ĉe V&R), unu el la plej popularaj en Argentino, kie ŝi serĉas junajn talentojn. "Ni eldonis verkojn de novaj aŭtoroj, kiuj verkas en la sama stilo de junuloj sur sociaj retejoj, kaj la libroj estis granda komerca sukceso", ŝi klarigas.

Rekordaj subskribaj sesioj

Leo Teti, 31-jaraĝa, estas alia el la fruaj literaturaj influantoj. Loĝanta en Barcelono, li nun estas direktoro pri internacia eldonado de Urano World Group (Monda Grupo Urano), kies katalogo inkluzivas la usonan aŭtoron Shelby Mahurin, kiu havas la rekordon pri libro-subskribado ĉe FIL en Bonaero – sepdek du sinsekvaj horoj! Sed ĉu la hodiaŭaj fanoj vere estas la legantoj de morgaŭ? Leo Teti pensas ke jes. "Ĝojas mi konstati, ke la influantoj nun ankaŭ interesiĝas pri porplenkreskula fikcio kaj eĉ en pli literaturaj verkoj. Kaj iliaj recenzoj ankoraŭ furoras, danke al ĉiuj tiuj junuloj disigantaj sian pasion por libroj", li diras.

Estas vere, ke la sociaj retejoj ĝenerale koncentriĝas sur establitaj aŭtoroj, kutime verkantaj en la angla. Sed de la entuziasmo de junuloj pri libroj ankaŭ profitas hispanparolantaj verkistoj, kvankam malpli. "Mi loĝas en Hispanio de preskaŭ tri jaroj nun", diras Leo Teti, "kaj mi povas vidi, ke estas vasta legantaro por lokaj aŭtoroj de porjunula literaturo".

La unua literatura evento kiu lanĉis aktivaĵojn por junaj legantoj estis la Gvadalaĥara-Foiro en Meksiko. En ĝia lasta salono, *TikTok* havis sian propran budon. "Ĉi tiu alianco estis tre profitdona. El 2 113 amaskomunikilaj ŝatoj en 2023, 20 procentoj estis por enhavo-kreantoj", klarigas Mariño González, komunika direktoro de tiu prestiĝa komerca foiro.

> **"La libro ne nur ne mortis, sed ankaŭ junuloj estas tiuj, kiuj tenas ĝin vivanta**

Ne surprizas, ke enhavokreantoj nun okupas elstaran lokon en komercaj foiroj, se konsidere ilian decidan efikon sur vendoj. "Unu el niaj grandaj mirindaĵoj en 2022 estis la hispana aŭtorino Alice Kellen. La laboro de literaturaj influantoj estis esenca por ŝia komerca sukceso", diras María Estomba, direktoro pri merkatiko kaj komunikado de Grupo *Planeta Argentina*. Sed libro-influantoj ankoraŭ konservas sian eldonan liberecon, kaj ilia subteno ne estas certigita. "Ili ankaŭ povas kritikadi libron aŭ aŭtoron, kiun ili ne ŝatas", sciigas María Estomba.



Naskiĝinta en mondo de ekranoj, la pli juna generacio ne turnis sian dorson al legado, kiel kelkaj antaŭdiris. Fakte, ili ankoraŭ multege favoras paperajn librojn. "Junuloj ŝatas librojn kun mapoj, paperaj kovriloj, legosignoj... Male al tio, kion vi povus pensi, ili ĝenerale preferas legi rakontojn sur papero, anstataŭ sur cifereca medio", diras Marcela Luza, kiu estis la estrino de la eldonejo V&R dum kvar jaroj. Cris Alemany, estro de Movida Juvenil ĉe la Bonaera Librofoiro, priskribas bildon de juna generacio kun hibridaj kutimoj. "Ĉe la Foiro, pli ol la duono de preskaŭ unu miliono da vizitantoj estas junuloj. Tio estas fonto de granda fiero kaj espero por la estonteco de libroj por la junularo". ■

-El la angla esperantigis Trefflé Mercier (Kanado)

Amrit Dhillon

Ĵurnalisto en Nov-Delhio, Barato

En Barato, famuloj prenas plumojn

Samkiel la eksa usona prezidento Barack Obama, la aktorino Natalie Portman kaj Meghan Markle, la edzino de princo Harry, kreskanta nombro da famaj baratanoj legas infanlibrojn. Sed fama nomo ne sufiĉas por vendi libron: bonkvalita rakonto daŭre estas la ŝlosilo al sukceso.

Malgraŭ populacio de 1,4 miliardoj da homoj, la nombro de famuloj en ĉi tiu grandega lando restas eta – plejparte limigita al Bollywood-steluloj – kaj ankaŭ la merkato por infanlibroj estas malgranda. Tamen la fenomeno estas reala: pli kaj pli da famuloj en Barato verkas librojn por infanoj.

Ekzemple, la fama produktisto Karan Johar verkis *La grandaj pensoj de eta Luv*. La konata politikisto Maneka Gandhi verkis *Estas monstro sub mia lito*. La aktorino Soha Ali Khan kaj ŝia edzo Kunal Khemu publikigis la serion *Inni kaj Bobo* kiu klarigas la respondecojn implicitajn en havado de dorlotbesto. Alia fama aktorino, Alia Bhatt, nun laboras pri infanlibro.

Kio estas okulfrapa pri ĉi tiuj famuloj estas, ke ilia verkemo venas de iliaj propraj spertoj. "La verkado estas ligita al fazo de ilia persona vivo – kiel gravediĝo (kaze de Alia Bhatt) aŭ gepatriĝo. Se ilia propra infano ŝatas ilian rakonton, ili ekpensas, ke eble ankaŭ aliaj infanoj ĝuos ĝin", diris Mansi Shetty, ĉefo de la porinfana branĉo ĉe Penguin Random House. Ekzemple, kiam Khan rakontis rakonton elpensitan de si mem, ŝia filino demandis: "kial mi ne povas vidi la rolulojn?" La respondo de Khan venis per publikigo de ilustrita rakonto.

Ambaŭtranĉa glavo

Kelkaj barataj famuloj fariĝis tre sukcesaj en ĉi tiu kampo. Unu el la plej bone vendataj porinfanaj aŭtoroj en la lando estas Sudha Murty, kiu ne estas aktorino, modelo aŭ kinreĝisoro, sed la edzino de Narayana Murthy, la fondinto de la grandega softvara kompanio Infosys.

> **"Pluraj gepatroj interesiĝas pri libroj verkitaj de famuloj**


Murty fariĝis publike konata kaj kiel bopatrino de la brita ĉefministro Rishi Sunak, kaj kiel aŭtoro de libroj pri sia vivo kaj infanlibroj. Ŝi komencis verki siajn tre popularajn librojn inkluzive de *Valizo plena je rakontoj de la avino*, kiu vendis 97 mil ekzemplerojn en 2021, kiam ŝi fariĝis avino. Ŝi volis rakonti al siaj nepoj rakontojn, kiujn ŝi aŭskultis kiel infano, ĉirkaŭ la temoj de familio, kundivido kaj kulturo.

Laŭ Priyanka Malhotra, direktoro de la librejo Full Circle en Nov-Delhio, kvankam junaj infanoj ne zorgas ĉu la aŭtoro estas famulo, tamen gepatroj ja sufiĉe interesiĝas pri aĉetado de la libro. Sed ŝi atentigas, ke la malo ankaŭ valoras: "Kelkaj gepatroj estos skeptikaj, opiniante ke bona aktoro ne estus bona verkisto, kaj ili preferos esti fidelaj al veteranaj aŭtoroj."

Buŝ-al-buŝe

Laŭ librovendistoj, estas la kvalito de libro kiu determinas ĝian sukceson. "Se la rakonto ne estas sufiĉe bona, gepatroj ne rekomendos ĝin buŝ-al-buŝe kaj restos fidelaj al konataj aŭtoroj, ĉu barataj, ĉu eksterlandaj. Mi ne rimarkas apartan postulon pri famaj aŭtoroj, nur pri bonaj libroj," rimarkas Priyanka Malhotra. Same okazas ĉe la eldonistoj, ilia decido ĉu eldoni libron aŭ ne dependas tute de la kvalito de la verko. Se ĝi ne estas kontentiga, la famo de la aŭtoro nenion ŝanĝos.

Interesiĝi pri temoj konformaj al zorgoj de gepatroj estas unu el la ŝlosiloj de sukceso. La libro de Khan pri la avantaĝoj kaj malavantaĝoj de dorlotbestoposedo povas esti parto



© Courtesy of Bloomsbury India / Vikas Khanna Group

◥ *Librokovrilo de* Nudpieda imperiestrino, *verkita de Vikas Khanna.*



de babilado kun eta infano pri akiro de dorlotbesto. Simile, la libro de Maneka Gandhi *Estas monstro sub mia lito*, disponigas solvojn por gepatroj, kies infanoj timas forlason aŭ mallumon.

La aliro de Maneka Gandhi estas alfronti problemojn, sed malpeze. Kiam ŝia nepino flustris al ŝia orelo, ke monstro dormas sub ŝia lito, ŝi simple respondis: “Bonŝanca vi! Mi ankaŭ volas unu“. Laŭ tiu sama linio de libroj celantaj veki la intereson de gepatroj, la fama kuiristo Vikas Khanna, kiu jam verkis la romanon *La magia knedorulo*, preparas kuirlibron por infanoj.

Kvankam verkoj de famuloj fariĝis sukcesaj en la lastaj jaroj, tamen estas klare por eldonejoj, ke ili tre malverŝajne sukcesos detronigi la plej ŝatatajn aŭtorojn de infanlibroj. Verkoj de famuloj allogas pro noveco, sed ĉu tiu sukceso daŭros? La tempo diros. ■

“Se la kvalito de la verko ne estas kontentiga, la famo de la aŭtoro nenion ŝanĝos

-El la angla kaj hispana esperantigis Rafael Henrique Zerbetto (Brazilo)

Intervuis
Agnès Bardon
UNESKO

“La kolizio inter teksto kaj bildo malfermas trian kampon de ebloj”

La aŭtorino kaj ilustrantino Delphine Perret, gajninto de multaj premioj, publikigis proksimume 30 librojn, en kiuj teksto kaj bildoj montriĝas en subtila dialogo de humuro kaj delikateco, kiu lasas sufiĉe da spaco por la imagokapablo de la leganto.

Ĉu ĉiam estis via intenco verkadi por infanoj?

Komence, mi interesiĝis pri verkado de ilustritaj libroj. Por diri la veron, kiam mi komencis, mi vere ne pensis pri la leganto. Tio estis ia neklara ideo por mi. Kiel multaj ilustristoj, mi komencis projekton kaj nur poste demandis min pri la ricevanto. Sed la dezirego krei verkojn, kiuj kunigas tekston kaj bildojn, kondukis min preskaŭ nature al laborado por infaneldonejoj. Hodiaŭ, tamen, mi scias al kiu mi parolas. Mi volas rakonti je infana nivelo.

Kion vi celas per “je infana nivelo”?


Verki je infana nivelo signifas esti sur mallarĝa vojo, kiu devas esti komprenebla, sed ne simpla. Temas pri defia postulo. Infanoj ne havas la saman sperton de la mondo kiel plenkreskuloj, do vi devas meti vin je ilia alteco, dum vi fidas

©Delphine Perret/Les Fourmis Rouges, 2016



◥ *Ilustraĵo de* Björn, Rakontoj pri Ses Ursoj.

© Delphine Perret / Les Fourmis Rouges, 2018



ilian inteligentecon. Estas grave fidi ilin, ĉar vi ne staros apud ili por rakonti la historion.

Kiam ni parolas al infanoj, ni nature tendencas meti nin je ilia nivelo. Kiam mi laboras en klasĉambro, mi ofte sentas la bezonon aŭ kliniĝi aŭ kurbiĝi, tiel ke la infanoj sentas, ke mi vere aŭskultas ilin. Estas iom tiel, kiam vi verkas; vi devas meti vin en pozicion de egaleco kun ili.

Same, libroj por infanoj havas la trajton celantan al infanoj kaj plenkreskuloj. Do, vi devas paroli al du legantoj samtempe – la leganto, kutime plenkreskulo, kaj la aŭskultanto – kaj foje adresi vin al unu kaj foje al la alia.

Kiuj libroj aŭ artistoj vin influis?


Kiel infano, mi amis profundiĝi en la mondon de la brita karikaturisto Quentin Blake. Lastatempe, mi renkontis liajn desegnaĵojn denove, kaj mi havis la saman senton kiel tiam, la saman deziron eniri la domon, kiun li desegnas, por renkonti liajn rolulojn. Mi ankoraŭ ĝuas legi librojn de Philippe Corentin aŭ Jean-Jacques Sempé. Mi ŝatas, kiam la roluloj estas tre vivaj kaj la bildoj havas fortan sugestan potencon.

Tiuj ilustristoj influis min, sed mi distingas inter tio, kion mi ŝatis kiel infano kaj kion mi ŝatas hodiaŭ kiel karikaturisto. Miaj desegnaĵoj estas rezulto de irado kaj venado inter la libroj, kiujn mi ŝatis legi kiel infano, kaj mia deziro esplori certajn formojn kiel dezajnisto. Vi devas trovi la ĝustan ekvilibron inter la du. Se vi nur esploras, vi apartigas vin de via leganto, kaj se vi nur pensas pri la leganto, vi malproksimiĝas de certa grafika kreemo.

Kiel vi alfrontas la rilaton inter teksto kaj bildoj en viaj libroj?

Ili havas du malsamajn lingvojn. La bildo devas esti komplementa al la teksto kie ajn eble. Iuj aferoj estas pli bone diritaj per vortoj, aliaj per desegnaĵoj. Vi devas ludi per ambaŭ esprimrimedoj. Foje, ankaŭ, mi ne sentas, ke mi volas desegni iujn scenojn, sed mi estas devigita, ĉar mi sentas, ke la leganto absolute volus vidi ilin. Mi pensas, ekzemple, pri paragrafo en mia libro *Björn, Rakontoj pri Ses Ursoj*, kie leporo ludas kartojn. Montro de tiu leporo efektive ne plu aldonas al la rakonto, ĉar la sceno jam estas priskribita en la teksto, sed ŝajnis al mi, ke la leganto volus vidi ĝin. Kaj kiel ilustristo, estis plezuro por mi montri ĝin al la leganto.

◥ *Ilustraĵo de* Grandega Vakera Rakonto*: "Mi anstataŭigis lin per simio ĉar oni diris al mi, ke vakeroj estas tro timigaj pro la malbonodora spiro kaj malbonaspektoj. Lia pafilo estas banano ĉar pistoloj estas tro danĝeraj."*



> **Verki je infana nivelo signifas esti sur mallarĝa vojo, kiu devas esti komprenebla, sed ne simpla**

En ilustrita libro, vi ankaŭ povas ludi per la malkongruo inter teksto kaj bildo. En *Grandega Vakera Rakonto* (*Une super histoire de cow-boy*), ekzemple, la desegnita rakonto estas tre malsama de tiu rakontita en la teksto. Estas la teksto, la bildo, kaj la kunpuŝo de la du, kiuj malfermas trian kampon de ebloj.

Ĉu vi elpensas la ideojn por viaj libroj antaŭ ol la projekto komenciĝas, aŭ dum la vojo?

Kiam mi laboras pri projekto, la temo, la teksto, la koncepto ĉiam venas unue. Tuj poste, ĉio ekgajnas formon en mia kapo. Mi bezonas rapide imagi la celon de la libro por povi ĝin realigi. Ekzemple, kiam mi komencis verki *Une super histoire de cow-boy*, mi volis vidi kia ĝi estus se mi pritraktas la tekston kaj bildojn ĝis punkto, kie ili estus preskaŭ du malsamaj rakontoj. Mia libro *Le Plus Bel Été du Monde* (*La plej bela somero en la mondo*), aliflanke, naskis la deziregon desegni pejzaĝojn. Nur →

Renkontoj kun legantoj estas momentoj, kiam vi povas kompreni, ĉu la libro estas percepta samkiel vi imagis, ke ĝi estus



© Delphine Perret / Les Fourmis Rouges, 2021

Kovrila ilustraĵo por La plej bela somero en la mondo.

poste, mi elpensis la rakonton. Mi volis ankaŭ rakonti pri la forpaso de la tempo, pri somero. Pro tio, mi uzis akvarelojn anstataŭ nigrablanka desegno, kiu estas mia kutima stilo. Fakte, la projekto ne iris laŭ la direkto, kiun mi origine planis. Vi devas akcepti, ke foje la libro fariĝas vojo.

Kelkfoje vi gvidas kursojn en lernejoj. Kion vi eksciis dum tiuj renkontoj kun viaj legantoj?

Ĉiam estas interese renkonti viajn legantojn, ĉar estas momentoj, kiam vi povas vidi, ĉu la libro estas perceptata kiel vi imagis ke ĝi estos, ĉu io perdiĝis survoje, aŭ ĉu la infano rakontis al si alian historion. Kiam la libro eliras, ĝi ne plene apartenas al ni; ĝi vivas sian propran vivon.

Kiam infanoj legis kelkajn el miaj libroj, kunligo estis tuj establita. Kelkfoje mi faras ilustrajn legadojn, kaj kiam la infanoj antaŭe scias la liniojn, tio estas vera plezuro. Estas kvazaŭ mi eniris tra unu pordo, ili venas tra alia, kaj ni troviĝas en la mezo de la ĉambro, en la fikcia mondo, en kiu mi invitis ilin partopreni kaj kies parto ili konsentis esti. ■



-El la angla esperantigis Ursula Grattapaglia (Brazilo)

Chrysogonus Siddha Malilang


Supera lektoro ĉe Universitato de Malmö (Svedio), doktoro pri Literaturaj Studoj (anglalingvaj). Li estas la redaktoro de Bookbird, *revuo de Internacia Porinfana Literaturo.*

Ludejo inter vortoj kaj bildoj

La bildoj en infanlibroj estas pli ol simplaj ilustraĵoj por la teksto. Ili aldonas alian dimension, ebligante al junaj legantoj krei sian propran interagon kun la roloj.

Legi, por infanoj, similas aventuron. La ideo kontentigi la ludeman instinkton de infanoj povas esti spurita reen al la publikigo de *Alico en Mirlando* de Lewis Carroll en 1865. La ludema esplorado de Alico en la disemisa Mirlando pelas la rakonton.

Ne estas klaraj moralaj valoroj instruitaj en la libro, kio faras el ĝi ludejon por infanoj por interagi kun siaj plej frenezaj revoj. Tiu libro ofte estas agnoskita kiel tiu, kiu markis la finon de la erao de didaktikismo en literaturo por infanoj, enkondukante novan eraon, kiam la aŭtoroj ekkreis ravajn aŭ amuzajn librojn.



Ilustraĵo el Paŝado de Rosie *(1968) de la brita aŭtoro kaj ilustristo Pat Hutchins.*

© Pat Hutchins, 1968 / Circonflexe, 2014

Legado kiel ludo

La koncepto "legado kiel ludo" ne postulas perfekte simetrian kombinaĵon de teksta kaj bilda rakontadoj; efektive, kiam la bildo spegulas nur tion, kion rakontas la teksto, la sperto estas malpli intensa, ol kiam estas breĉoj inter tiuj du elementoj. Ekzemple, la libro *Paŝado de Rosie* de la brita ilustristo kaj verkisto Pat Hutchins, de 1968, prezentas du malsamajn rakontojn. Dum la teksta rakontado mencias nur la tre normalan marŝadon de la kokino Rosie sen ajna konflikto, la ilustraĵo rakontas la aldonan rakonton de la malsukcesaj klopodoj de la vulpo por embuski Rosie tra ŝia tuta promenado. Ĉi tiu paralela rakontado ne estas facila afero por komuniki nur per vortoj.

La luda interplektado de vortoj kaj bildoj ebligas prezenti temojn antaŭe konsideratajn tabuajn por junaj legantoj. *Kie estas la sovaĝaj bestoj* (1963) de la usona aŭtoro kaj ilustristo Maurice Sendak, rakontas la historion de knabo, kiu traktas sian koleron. La ludo de Sendak kun kadroj kaj la progresiva ekspansio de la bildoj ĝis ili atingas la randojn de la paĝo, kio estas lia invito al junaj legantoj partopreni kun Max en lia aventuro. Dum la bildoj daŭre etendiĝas, la teksto malrapide malaperas, kio proponas ludan spacon al la legantoj. La procezo, kiu temas pri la kolero kaj paciĝo, estas dirita en tiuj senvortaj paĝoj: la manko de direktitaj vortoj ebligas al la juna leganto krei sian propran interagon kun la roloj.

> **Senvortaj libroj ebligas al junaj legantoj enmeti siajn sperton kaj scion en la rakonton**



© Shaun Tan / Hachette Aŭstralio

Ilustraĵo el La Ruĝa Arbo *de Shaun Tan (Aŭstralio).*

Silentaj libroj

Senvortaj bildlibroj estas relative nova formato en la literaturo por infanoj. La manko de klara teksta rakontado en la tuta libro postulas, ke la ilustristo regu tiajn teknikojn kiel la kreado de bildaj metaforoj, kiuj akordiĝas kun infanoj. Iagrade, la depreno de vortoj ankaŭ faciligas diri malfacilajn, nedireblajn aferojn.

En *Flava Papilio* (2023), senvorta bildlibro de la ilustristo Oleksandr Shatokhin, la milito estas vidata tra la okuloj de juna knabino, kiu trovas esperon en la simbolo de flavaj papilioj.

En *La Ruĝa Arbo* (2001), la aŭstralia aŭtoro kaj ilustristo Shaun Tan uzas superrealajn, malgajajn bildojn por priskribi deprimon, dum la korea ilustristo Suzy Lee priskribas klasikan muzikon tra sia senvorta libro *Estate* (2022).

> **“La interplektado de vortoj kaj bildoj ebligas prezenti temojn antaŭe konsideratajn tabuaj**

Ankaŭ la lingva baro estas rompita per tiu senvorteco, ebliganta al iu ajn infano legi la libron. Junaj legantoj povas enmeti siajn proprajn spertojn kaj sciojn en la libron kaj ekposedi la rakonton komence kreitan de plenkreskuloj. ■

-El la angla esperantigis Trefflé Mercier (Kanado)

Cristina Puerta
UNESKO

Kio faras nin homaj


Prezentita en la formo de enigmo, ĉi tiu ilustrita libro de Victor D.O. Santos kaj Anna Forlati argumentas favore al diversa kaj plurlingva mondo. UNESKO kunigis fortojn kun eldonistoj el la tuta mondo por certigi, ke la libro estu distribuata en kiel eble plej multaj lingvoj.

Por la plejmulto da homoj, terminoj kiel "marglacio" aŭ "bankizo" sufiĉas por karakterizi la glacian formitaĵon sur la akvosurfaco. Sed la loĝantoj de la Beringa Markolo kaj Gronlando uzas preskaŭ 1500 esprimojn por bildigi la multajn facetojn de ĉi tiu fenomeno. Interesa fakto estas, ke se la inuit-aleutaj lingvoj malaperus, ĉiu scio asociita kun ĉi tiu terminologio malaperus kun ili, malhavigante al sciencistoj utilajn informojn en ĉi tiu tempo de klimatŝanĝiĝo.

Ĉe risko je malapero de 40% de la mondaj 7 000 vivantaj lingvoj, pro manko de parolantoj, ĝis la fino de la 21-a jarcento, *Kio faras nin homaj*, libro de la brazila lingvisto Victor D.O. Santos kaj itala ilustristo Anna Forlati, prilumas la gravecon de lingva diverseco. Antaŭ ol eldoniĝi en Brazilo, ĝi estis elektita en 2022 de ĵurio de specialistoj de *Prezento de Nepublikigitaj Libroj* de la platformo *dPICTUS* (kiu prezentas kelkajn de la plej bonaj bildlibroj aperigotaj) kaj la prestiĝa Internacia Junulara Biblioteko en 2023.

> **“*Kio faras nin homaj* malkovras ne nur la riĉecon de plurlingva mondo, sed ankaŭ ĝian fragilecon**

Kio faras nin homaj © Eerdmans Books for Young Readers / UNESKO



Kion signifas nomo?

La demando en la tragedio de Ŝekspiro, kiun Julieta starigas al si, kiam ŝi ekscias, ke Romeo estas portanto de la familia nomo Montegio (“Kion signifas nomo? Ĉu tio, kion ni nomas rozo / Kun iu alia nomo odorus same dolĉa”) ŝajnas esti pli lingvistika ol infanliteratura. Tamen, *Kio faras nin homaj* demonstras, ke lingvo estas ilo, homa konstruo, kiun sennombraj generacioj formis kaj sencigis.

Starigante la demandon pri la naturo kaj funkcio de lingvoj, la libro havas la saman intencon kiel pluraj aliaj porinfanaj tekstoj, kiaj estas *La libro de sensencaĵoj* de Edward Lear (1846), *Kion oni diras, kara?, libro pri etikedo por ĉiuj okazoj* de Sesyle Joslin kaj Maurice Sendak (1958) aŭ *Achimpa* de Catarina Sobral (2012).

Kio faras nin homaj malkovras riĉecon de plurlingva mondo, sed ankaŭ ĝian fragilecon. Ĝi do estas esenca ilo por la Internacia Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj (2022-2032), kiun gvidas UNESKO kune kun la Sekcio pri Ekonomio kaj Sociaj Aferoj de Unuiĝintaj Nacioj por atentigi pri la alarma malaperado de lingvoj kaj la urĝa bezono ilin savi.

Dudek unu eldonaĵoj… kaj pliaj (sekvontaj)

UNESKO laboradas pri dudek unu eldonserioj de la libro de Victor Santos, speciale en la lingvoj mapuĉa, asturia kaj marata, kun la sekvaj eldonejoj: *Abacatte* (Brazilo), *Les 400 Coups* (Kanado), *Planeta Sostenible* (Ĉilio), *Everafter* (Ĉinio), *Epomenos Stathmos* (Grekio), *Jyotsna Prakashan* (Barato), *Tuti Books* (Irano), *Terre di mezzo* (Italio), *Nishimura* (Japanio), *Vizavi* (Maŭricio), la Ministerio pri Kulturo de la federacia subŝtato Querétaro (Meksiko), *Penguin Random House* (Portugalio), *Malinc and Hart* (Slovenio), *La Maleta* (Hispanio), *Kalimat* (Unuiĝintaj Arabaj Emirlandoj) kaj *Eerdmans* (Usono). La projekto daŭras, kun la celo plivastigi ĉi tiun liston.

Engaĝitaj eldonejoj

Por konsciigi homojn pri la Jardeko, UNESKO kunpublikigas unulingvajn kaj dulingvajn versiojn de *Kio faras nin homaj*, kaj en disvastiĝintaj lingvoj kaj en lingvoj regionaj aŭ indiĝenaj (rigardu la tabelon). La celo estas konservi plurlingvajn kaj diversajn spertojn de la mondo. “Ĉar ekde kiam homoj ekekzistas, ili trovis manierojn komuniki kun siaj kunuloj. La skribita vorto, kaj poste libroj, donis al ĉi tiuj lingvoj la oportunon postlasi siajn markojn, por servi al estontaj generacioj. Nun, evoluo

Kio faras nin homaj © Eerdmans Books for Young Readers / UNESKO





Kio faras nin homaj © Eerdmans Books for Young Readers / UNESCO

Infanoj lernantaj per sia denaska lingvo havas probablecon 30 procente pli altan kompreni tion, kion ili legas fine de elementa lernejo

en la ĝusta direkto dependas nur de ni," klarigas Simon de Jocas, direktoro de la kanada eldonejo *Les 400 Coups*.

Ĉi tiu kunlaborado kun UNESKO demonstras la rolon, kiun povas ludi eldonejoj en la revivigo de regionaj kaj indiĝenaj lingvoj. Nun ni scias, ke infanoj, kiuj lernis per la hejme parolata lingvo, havas probablecon pli altan je 30 procentoj pli bone kompreni tion, kion ili legas fine de elementa lernejo, kaj ili havas pli bonajn sociajn kapablojn. Pro tio UNESKO festas la Internacian Tagon de la Gepatra Lingvo en la 21-a de februaro, alvokante registarojn subteni plurlingvan edukadon dum la fruaj jaroj de lernado.

"Krei legantaron"

En landoj, kiuj sekvis la alvokon, evoluas nova merkato por lernejaj tekstoj kaj infanliteraturo. Same en subsahara Afriko, kie oni multe debatas pri la defioj de la kreskanta merkato. Dum kelkaj opinias, ke libroj en lokaj lingvoj reflektu ĝiajn tradiciojn, aliaj opinias, ke tiuj lingvoj devas esti pontoj al aliaj kulturoj. Tio estas la opinio de Edwige-Renée Dro, eburborda aŭtoro kaj librovendisto, kiu priskribas la defion tiel: "Nun ni devas krei legantaron."

Jen ankaŭ oportuno por unuigi la agantojn de la publikiga ĉeno ĉirkaŭ unu projekto: akcepti nian propran indiĝenan heredaĵon, ne antaŭenigi ĝiajn asimiliĝon, izolitecon kaj riskon je malaperado. Eldonejoj havas la krean forton kaj energion; registaroj havas la povon kaj rimedojn por ŝanĝi politikon. Ĉilio, ekzemple, akiris 27 mil volumojn de la dulingva hispan-mapuĉa eldono (Planeta Sostenible/UNESKO) por ekipi lernejojn kaj publikajn bibliotekojn.

Kune, eldonejoj kaj registaroj povas doni al multaj infanoj eblojn ekkonscii siajn kapablojn. Ĉar malantaŭ ĉiu vorto troviĝas identeco, vivanta heredaĵo. Ĉiu persono, en ĉiu kulturo, povas kontribui por konservi la mondon riĉa kaj diversa. ■

-El la angla esperantigis Frank Lappe (Germanio)

Anuliina Savolainen
UNESKO

Marisha Rasi-Koskinen, la ribelema plumo



Premiita aŭtoro, lerneja psikologo kaj eksa punkulo, Marisha Rasi-Koskinen okupas unikan lokon en la finna literatura pejzaĝo. Adoleskantoj ŝategas ŝiajn ambiciajn librojn, kiuj sentabue traktas temojn, kiuj koncernas ilin.

Kion vi farus, se vi renkontus pli junan version de vi mem? Ĉi tiu demando estas en la koro de la porjunula romano *La kaŝita flanko de la suno* de Marisha Rasi-Koskinen. En ĝi, adoleskulino aventuras en la misteraj akvoj de memoro kaj ekzistecaj demandoj kaŝitaj sub la surfaco de izolita mineja urbo. Dum ŝi vojaĝas tra la tempo, ŝi renkontas malsamajn versiojn de si mem. Hipnotiga miksaĵo de rakonto pri maturiĝo, malutopia rakonto kaj sciencfikcia krimromano, la libro gajnis la Premion Finnlando pri Porinfana kaj Porjunula Literaturo en 2019. "Mi nomus ĝin spekulativa fikcio. Ĝi temas pri distordo, kiu neatendite turnas la realon," klarigas la finna verkisto kaj psikologo.

Naskiĝinta en Finnlando en 1975, Rasi-Koskinen estas aŭtoro de sep libroj, inkluzive de du romanoj por adoleskantoj kaj junaj plenkreskuloj. Ĝis nun, ŝiaj verkoj estas tradukitaj en la danan, la francan, la galegan, la hungaran, la hispanan kaj la litovan. Verkite ĉu por plenkreskuloj, ĉu por infanoj, ŝiaj romanoj havas kiel fokusojn la ambiguecon de rememoroj kaj la ekvilibron de povoj en la rilatoj inter homoj. Rolulo malofte estas nur infano, adoleskanto aŭ plenkreskulo; prefere, identecoj varias inter la pasinteco, la nuntempo kaj la estonteco. Trovi sin, perdiĝi kaj eliri el la ordinara vivovojo estas aliaj kutimaj temoj de ŝiaj verkoj.

Nekonformisma junularo

Marisha Rasi-Koskinen de sia plej frua infanaĝo ŝategas rakontojn kun neatendita turno. Ŝi kreskis en Viisarimäki, urbeto en centra Finnlando ĉirkaŭita de arbaroj kaj lagoj, kaj la biblioteko en la najbara urbo rapide iĝis ŝia dua hejmo.

Dum sia adoleskeco ŝi estis "ribela punkulo": ŝi kutimis kudri siajn proprajn vestaĵojn, surhavi motorciklistan jakon kaj kolorigi sian hararon verda. En mezlernejo ŝi elektis psikologion kiel nedevigan fakon, kaj tio estas esenca elekto kiu eble kondukis ŝin studi, jarojn poste, Socian Psikologion en la Universitato de Tampereo, en la okcidenta parto de la lando, kaj labori kiel lerneja psikologo.

"Kiam mi diplomiĝis, mi eklaboris pri infanoj, unue en konsilejo por familioj kaj poste kiel eduka psikologo," ŝi klarigas. Dum ĉi tiu okupata periodo, ŝi ankaŭ verkis sian debutan romanon kaj prizorgis siajn proprajn infanojn, ĝis tiam kiam ŝi fariĝis plentempa verkisto en 2019.

Konstanta disponebleco

Nun estas decembro 2023 kaj Marisha Rasi-Koskinen estas en Parizo por diskonigi la francan tradukon de sia 650-paĝa romano *REC* (2020), kiu gajnis la prestiĝan literaturan premion Runeberg, en 2021. La rakonto evoluas ĉirkaŭ la amikeco inter du adoleskantoj, Lucas kaj Cole, en mondo regata de bildoj kaj sociaj retejoj.

"En la nuna 'registra kulturo', infanoj ĉiam estas disponeblaj, atingeblaj de la gepatroj aŭ aliaj, kaj ili povas esti iam ajn kaptitaj sur ekrano. La efiko kiun ĉi tiu kontinua peto por haveblo havos sur iliaj personecoj estos evidenta nur retrospektive," ŝi pripensas.

Ŝia trankvila kaj trankviliga konduto

> **"En la nuna 'registra kulturo', infanoj povas esti iam ajn rigardataj sur ekrano**

de psikologo povas esti perceptita en ŝia sinteno, kun ŝiaj manoj krucitaj sur ŝiaj kruroj. Tamen ŝia skarlata hararo, ŝia elekto pri veganaj manĝetoj kaj ŝia scivolemo pri ĉio marĝena memorigas nin pri ribelema adoleskanto. Ŝi diras, ke ŝi daŭre pruntas amasojn da libroj kaj ŝatas verki en la publika biblioteko, loko, kiun ŝi vidas kiel "metaforon pri socialema ŝtato: ĉiu povas iri tien, ĝi kostas neniom kaj estas malfermita al ĉiuj".



> **Kiam vi verkas por junuloj, la ago devas kongrui kun ilia mondo**

© Emilie Möri / VOZ'Image

Ŝia sperto labori kiel psikologo – jaroj de malkodado de emocioj, detektado de kialoj malantaŭ lernomalfacilaĵoj kaj aŭskultado de zorgoj de infanoj, instruistoj kaj gepatroj – kiel tio influis ŝian verkadon? "Laŭ mi, psikologio, precipe socia psikologio, kaj verkado estas intime ligitaj. Konsciiĝi pri tio, ke ni konstante kreas la realon el niaj interparoloj kaj ke ni alprenas malsamajn identecojn kaj parolmanierojn depende de nia interparolanto, malfermis al mi perspektivojn, kiuj speguliĝas en miaj verkoj. La perspektivo de la aliulo estas kaŝita malantaŭ ĉiu rakonto."

Eligi la enan adoleskanton

La verkoj de Marisha Rasi-Koskinen estas tiaj, ke oni malkovras malsaman rakonton dum relegado. La aŭtoro plene agnoskas la kompleksecon de siaj rakontoj. "Kiam mi verkas por juna publiko, mi provas akompani ilin ĝis la fino tra la rakonto, fokusi la atenton sur la intrigo kaj fidi ĉefe al la agado. Sed miaj libroj por junuloj ne estas facile legeblaj; Mi verkas por homoj, kiuj jam evoluigis guston por legado," ŝi konfesas. Pruvo, ke ŝiaj postulemaj rakontoj ne malkuraĝigas adoleskantojn, estas *La kaŝita flanko de la suno*, kiu gajnis la premion Nuori Aleksis en 2020, aljuĝitan de ĵurio de adoleskaj legantoj.

Kiam ŝi verkas por junuloj, ŝi lasas sian enan adoleskanton esprimi sin. "Mi verkas kvazaŭ adoleskanto, kiu mi ankoraŭ estas, kiu ankaŭ estas mia implica leganto. Kiel plenkreskulo, mi estas tie por subteni ŝin, sed mi ne rajtas juĝi ŝin aŭ doni al ŝi lecionojn," ŝi klarigas.

"Estas bone havi facile legeblajn librojn por stimuli amon al legado, sed ni bezonas ankaŭ pli ambician porjunulan literaturon", ŝi atentigas. "Kiam vi verkas por junuloj, vi povas trakti ajnan temon, sed la agado devas kongrui kun ilia mondo. Kompreneble, dek-kvin-jarulo ne tre emas legi pri tipaj problemoj de kvardekjaruloj..."

Ŝiaj libroj ankaŭ estas maniero repaciĝi kun aĝo konsiderata malfacila, kun tiu delikata momento, kiam ĉiuj pordoj estas malfermitaj, almenaŭ teorie. "Estas interese observi ĉi tiun paradokson: ju pli ni idealigas nian junecon, des pli ni neglektas nian adoleskon. Multaj homoj volas havi infanojn, sed kiu volas havi adoleskanton? De kie venas ĉi tiu malbona opinio pri tiuj kiuj ni estis dum juneco?" ŝi demandas.

Se ŝi povus vojaĝi reen en la tempo, ĉu adoleskanto Marisha vidus sian plenkreskan memon hodiaŭ, ĉirkaŭitan de parizaj ĵurnalistoj kaj filmitan de sia franca redaktisto por reklama video? La aŭtoro ridas: "Mi supozas, ke ŝi trankviliĝus vidante la plenkreskulon, kiu mi fariĝis, kaj pensus: ŝi ŝajne ne estas tiel stulta." ■

-El la angla kaj hispana esperantigis Rafael Henrique Zerbetto (Brazilo)

Ghalia Kadiri

Ĵurnalisto en Kazablanko/ Darulbajdo, Maroko

Nadia Essalmi, pioniro de porinfana eldonado en Maroko

En 1998, Nadia Essalmi fondis Yomad, la unuan eldonejon dediĉitan al porinfana literaturo en Maroko, kun la celo oferti al junaj legantoj librojn, kiuj reflektas ilian realon. Ĝia katalogo nun inkluzivas ĉirkaŭ cent titolojn, sed restas konstanta defio produkti kaj distribui originalajn librojn.

Nadia Essalmi ne havas tempon por perdi. Ŝi ĵus forlasis librovendejon en la butik-kvartalo Maarif en Darulbajdo, kie ŝi reklamis sian lastan romanon. La atlet-aspekta kvindek-jarulino moviĝas de unu renkontiĝo al la sekva, de unu projekto al la sekva, kaj de unu okupo al la alia. Eldonisto unue kaj ĉefe, ŝi ankaŭ estas verkisto, direktoro de literatura festivalo kaj komunuma aktivulo. “Mi ne povas resti senmova. Eĉ kiel infano, mi estis tre aktiva,” ŝi konfidas, kun eksplodo de rido, dum ŝi sidas sur kafeja teraso en ĉi tiu vigla distrikto de la ekonomia ĉefurbo de Maroko.

La kreado de Yomad, la unua eldonejo pri porinfana literaturo en Maroko, estas sendube ŝia plej ambicia projekto. “En 1998, kiam mi estis en librofoiro en Parizo, mi konstatis, ke ne estas eĉ unu infanlibro en la maroka budo,” klarigas ĉi tiu eleganta kaj ridema brunulino. Kelkajn monatojn poste, Yomad naskiĝis. “Mi ne vidas min kiel eldoniston, sed prefere kiel eldonejan aktivulon, ĉar ĉiutage estas batalo. Mi prizorgas ĉion - de la fasonado kaj aranĝo de la libroj al provlegado kaj pakado. Ĉion!” diras ĉi tiu marokanino, kiu kreskis en Darulbajdo, antaŭ ol translokiĝi al Rabato kaj krei familion.

Kovrilo de la trilingva libro de marokaj infanrimaĵoj (franca, araba kaj tamazi̇ht).



© Ĝentileco de Yomad Editions

“La kolekto Marokaj Rakontetoj (Comptines marocaines), unua el sia speco en Maroko, kunigas 24 infanrimaĵojn kaj lulkantojn

En lando, kie la eldona oferto por junaj legantoj estas delonge limigita al importitaj libroj, realigo de tia projekto ne estis facila tasko. "La sektoro ankoraŭ disvolviĝas. Porinfanaj verkistoj estas maloftaj, same kiel ilustristoj," ŝi atentigas. Pli ol 25 jarojn poste, Yomad havas cent titolojn je sia merito, kun meznombra presado de mil ekzempleroj.

Levi konscion en lernejoj

Sed estas ankoraŭ multaj defioj. "Mi eldonas malmultekostajn librojn por demokratiigi legadon, sed ĉar la monprofito estas malgranda, libroservoj ne vere interesiĝas. La kerno de la problemo kuŝas en distribuado, kaj ĝis nun, neniu solvo estis trovita," ŝi bedaŭras. Eĉ la maroka legantaro restas malfacile mobilizebla. "La mensoj estas formitaj surbaze de aliaj stiloj de libroj. La publiko ne ĉiam vidas la valoron de lokaj produktaĵoj."

Sed Nadia Essalmi ne estas iu, kiu rezignas. Ŝi vokas al famaj magrebaj verkistoj, kiel ekzemple Driss Chraibi, Mohamed Dib kaj Fouad Laroui, kiuj donas al la libroj pli grandan videblecon. Samtempe, ŝi komencis longan konsciiĝo-kampanjon en lernejoj kaj ĉe familioj por reklami surloke produktitajn librojn. "Kiam ni importas librojn, ni importas tutan mondvizion kun ili," insistas la eldonisto. "Patro Kristnasko aŭ la Turo Eiffel ne havas multe da signifo por infano, kiu neniam forlasis Marokon. Infano bezonas enradikiĝi en sia propra kulturo por disvolviĝi."

Yomad ĉefe publikigas tekstojn en la franca kaj la araba, kaj ankaŭ manplenon da verkoj en la tamazi̇ht. Celante infanojn kaj adoleskantojn, ili prezentas elementojn de ĉiutaga maroka vivo, metitajn sur fono de romantikismo. Emblemaj titoloj inkludas *La legendoj de Darulbajdo* (*Les légendes de Casablanca*) de Mostapha Oghnia, kaj *Abdelkrim El Ḫatabi, la heroo de Rifo* (*Abdelkrim El Khattabi, le héros du Rif*), kiu rakontas la aventurojn de historia figuro en la Rif-rezisto kontraŭ kolonia regado. La infanrakontoj *Marokaj Rakontetoj* (*Comptines marocaines*), kolekto, unua en sia speco en Maroko, kiu kunigas 24 infanrimaĵojn kaj lulkantojn elprenitajn el la parola heredaĵo de Maroko, kiun Nadia Essalmi zorge rekunmetis.



© Courtesy of Yomad Editions



Verkisto kaj eldonisto Nadia Essalmi en sia hejmo, en 2021.

Gusto pri legado

Antaŭenigo de legado en Maroko fariĝis ŝia vivmisio. Krom sia laboro kiel eldonisto, ŝi gvidas kulturan revuon, prizorgas literaturan kafejon kaj starigas komunumajn projektojn. En 2017, ŝi kreis la festivalon *Vojaĝantaj literaturoj* (*Littératures Itinérantes*), ejon por interŝanĝoj inter verkistoj kaj legantoj kiuj vojaĝas de urbo al urbo.

"Ĉiuj infanoj naskiĝas por esti legantoj. Sed se ni ne tenas tiun flamon vivanta, ĝi estingiĝas." Ŝi evoluigis sian propran guston pri legado en la aĝo de ok jaroj, ĉe domoj de najbaroj. "Ne estis libroj en mia familio, do mi utiligis multan tempon ĉe miaj najbaroj, legante kaj pruntepreneante iliajn librojn – mi fariĝis libromaniulo!" ŝi memoras. Jarojn poste, ŝi estas tiu, kiu stimulas guston por legado al infanoj. En 2016, ŝi lanĉis *Legi por kreski* (*Lire pour grandir*) en Rabato, iniciaton desegnitan por progresigi legadon ĉiudimanĉe, kiu estis etendita al 15 urboj tra la lando. Pere de sia laboro ĉe komunumaj organizoj, ŝi regule vizitas kamparajn areojn de Maroko, kie ŝi jam helpis renovigi lernejojn kaj ebligis la konstruadon de biblioteko. "Se mi povas alporti al ili iom da feliĉo per literaturo, mi venkis," ŝi diras. ■

> **"La publiko ne ĉiam vidas la valoron de lokaj produktaĵoj**

-El la angla esperantigis Renato Corsetti (Italio)


ZOMO
特技
EFFECTS
喊烟花
MAKE FIREWORKS
BY SHOUTING



Fotoj :
Yishu Wang

Teksto:
Gina Doubleday,
UNESKO

La mistero en la ordinara

Jen la arto sublimigi la ordinaron: maro de koloraj ĉapeloj, malplena ponto en monta pejzaĝo, amaso da oficialuloj en malhelaj kostumoj. En la bildoj de Wang Yishu, ĉiutagaj objektoj kaj agordoj sugestas apartan mondon. Figuroj estas ofte fotitaj de la dorso; iliaj vizaĝoj estas malklarigitaj aŭ eble montritaj en spegulo. Bildoj estas ŝajne hazardaj kaj elvokas malsamajn humorojn, de viro tenanta anseron sur urba strato ĝis ekblovo de neĝeroj nokte rigardataj tra fenestro.


Naskiĝinta en Gansuo en 1973, Wang Yishu ekpraktikis fotoĵurnalismon kiam li estis studento pri literaturo. Liaj malsamaj projektoj igis lin vojaĝi tra Ĉinio, de grandaj urboj al la plej izolitaj vilaĝoj. Tamen lia laboro estas la malo de preciza raportado. Kvankam ĝia fokuso estas la ordinara, objektoj kaj agordoj estas prezentitaj kiel elvokivaj kaj pasemaj, foje kun dozo de humuro. Li dokumentas hazardajn bildojn, kiuj elkuntekste kreas sian propran misteran mondon. Eĉ la nomoj de liaj kolektoj – *Senlima, Malferma fino, Sentitola Filmo* – sugestas universalaĵon, nepenetreblecon kaj mankon de klara difino en ĉiutagaj objektoj kaj lokoj.

Li ankaŭ fotas modon, kiu petas modelojn esti pli "realaj", prefere al favorado de klasikaj modaj pozoj. Liaj plej ŝatataj temoj por lia propra laboro estas fajro, nuboj, vento, bestoj kaj homaj vizaĝoj. Por ĉiuj fotoj, li preferas labori kun natura lumo kaj foje uzas fulmlumon, kun malmulta aŭ neniu post-prilaborado.

Liaj bildoj estas scenoj izolitaj, reflektoj de universo kie la spektanto povas projekcii sian propran interpreton kaj propran sperton. ■

-El la angla kaj franca esperantigis Kim Ribeiro (Brazilo)












AIRBUS



















© Christophe Raynaud de Lage

Tiago Rodrigues:
“La teatro estas la ideala loko por inventado de kolektiva memoro”

Portugala aktoro kaj reĝisoro, Tiago Rodrigues ankaŭ estas la aŭtoro de tre aplaŭditaj teatraĵoj, en kiuj li celebras la potencon de vortoj kaj pridubas la nocion de memoro, svagigante la limojn inter persona rakonto kaj kolektiva historio, fikcio kaj realo. En 2023 li estis nomumita direktoro de la Festivalo de Avinjono (Francio), la plej grava evento de teatro kaj vivaj prezentaĵoj en la mondo.

Via unua renkonto kun teatro datiĝas de via adolesko. Kiel ĝi okazis?

Mi malkovris teatron kiam mi ne estis serĉanta ĝin. Mi kreskis en Amadora, urbo en la ĉirkaŭaĵoj de Lisbono, kaj mi ne aparte ŝatis teatron. Mi estis 14-jara kiam profesoro pri sociologio, kiu ne estis unu el miaj instruistoj, ekvidis min dum lernopaŭzo. Vidante min sola, dum mia legado, li venis al mi kaj kuraĝigis min ĉeesti kurson pri teatro, okazantan ĉiusabate matene. Ĉar mi ne estis antaŭe aliĝinta, mi pensis, ke tio ne eblus, sed li insistis.

La sekvan sabaton mi ĉeestis la kurson. La renkonto kun la aliaj lernantoj kaj la ĝuado de la laboro super la tekstoj estis sufiĉaj por konvinki min, ke mi restu kun ili. Sed mi neniam imagis en tiu momento, ke tio iĝos mia profesio. Estis ĉe la fino de la mezlerneja studado, kiam iom diletante kaj post unujara paŭzo, mi partoprenis konkurs-ekzamenon ĉe la Supera Lernejo pri Teatro de Lisbono. Mi ne estis akceptita, sed mi gajnis la unuan lokon en la listo de nesukcesintaj kandidatoj. Alia nesukcesa lernantino kontestis sian kvalifikon. La lernejo konfesis ŝin prava kaj akceptis ŝin, sed ĉar ŝi estis lokita en la tria loko, ankaŭ la du kandidatoj, kiuj staris antaŭ ŝi, devis esti akceptitaj. Tiele, kune kun la lernanto Nuno Lopes, kiu nuntempe estas famkonata aktoro en Portugalio, mi sukcesis finfine esti akceptita en tiu lernejo. Do estis sinsekvo de koincidoj, kio venigis min en la mondon de teatro.

> “
> **Kiam mi kreas prezentaĵon, mi ĉiam imagas ĝin kiel formon, kiu povas esti tradukita**

Sed hazardo ne ĉion eksplikas. Ankaŭ la deziro fari teatron estis motoro en via kariero.

Jes, sed tiu deziro alprenis diversajn formojn. Mi ne finis mian studadon en la lernejo pri teatro ĉar mi renkontis belgan trupon el Antverpeno, kiu estis unuafoje turneanta tra Portugalio. Mi partoprenis teatro-atelierojn kun tiuj artistoj kaj sekvis ilin, pli-malpli kiel vilaĝa infano, kiu forfuĝas kun cirko. Tiu trupo malfermis miajn okulojn al aliaj estetikaj modalecoj, al aliaj artistoj, kaj plivastigis miajn horizontojn.

Kiam mi estis tre juna, mi rimarkis, ke mia rilato kun teatro estas ankaŭ rilato kun la mondo kaj kun kontinento: Eŭropo. Fakte, kiam mi kreas prezentaĵon, mi ĉiam imagas ĝin kiel formon, kiu povas esti tradukita. La imaga publiko, kiun mi alparolas, ne estas nur portugala; en mia menso, teatro estas ligita kun la ideo de →


© Magda Bizarro

nomadismo. Eble tio estas iom romantika rigardo, sed mi ŝatas konstrui familion ĉirkaŭ projekto, familion, kiu eble estas efemera, sed kiu vojaĝas, rakontas historiojn kaj kolektas rakontojn, kiuj nutras estontajn projektojn. Por mi, krei spektaklon estas kiel prepari miajn valizojn kaj ekvojaĝi.

***Via tre sukcesa teatraĵo* Parkere estis inspirita de biografia epizodo: via avino, kiu estis perdanta sian vidkapablon, petis vin elekti libron el ŝia biblioteko, por ke ŝi povu lerni ĝin parkere. Kiel tiu ĉi persona sperto iĝis teatraĵo?**

Parkere fakte baziĝas sur io intima, la rilato, kiun mi havis kun mia avino, kiu inspiris al mi ŝaton al literaturo kaj legado. Kiam ŝi petis min elekti libron, kiun ŝi povus lerni parkere, mi eksciis tiun tagon – mi bone memoras ĝin – ke tio estis la komenco de teatraĵo. Eble ĝi estas la teksto, en kiu mi elmontras min plej persone, sed ĝi ankaŭ estas tiu, en kiu mi plej internigas en la labirinton de fikcio. Mi provas konekti nevideblajn fadenojn inter verkistoj kiel Boris Pasternak, nobelpremiito pri literaturo, kaj mia avino, kuiristino en malgranda vilaĝo en la nordoriento de Portugalio. Ĝi ankaŭ estas teatraĵo de imagado kaj elvokado, ĉar mi invitas dek spektantojn surgrimpi la scenejon por lerni Ŝekspiran soneton, la libron, kiun mi fine elektis por mia avino. Ĝi estas maniero tuŝebligi la fenomenon de transdono, kiun teatro efektivigas.

Parkere estas speco de arta pasporto por mi. Ĝi estas spektaklo, kiu pritraktas, laŭ la plej esenca maniero, ĉiujn temojn proksimajn al mia koro. Ĝi ludas per la rilato inter realo kaj fikcio, inter intima rakonto kaj kolektiva historio. Ĝi ankaŭ estas teatraĵo pri la potenco de vortoj. Miaj teatraĵoj ne pretendas esti spegulo de la mondo, sed krei fikcion enradikiĝintan en la realo.

Ĉu vi opinias, ke nuntempe ekzistas risko, ke la kolektiva memoro estu forviŝita?

Mi pensas, ke ekzistas risko, ke ni ne plu povos produkti kolektivan memoron. Kaj ĉi tie mi ŝatus fari distingon inter arkivoj kaj memoro, tio estas inter faktoj kaj la ago memori ilin, kaj produkti valorojn el tiu memoro. Por mi, memoro ne estas scii, ke dum la portugala inkvizicio en la 16-a jarcento okazis masakro de judoj. Ĝi estas la kapablo diskonigi la sciojn pri tiu evento kaj krei penson el tiu scio.

En tiu ĉi senco, mi kredas, ke la fido je la ideo de senfina kaj daŭra havebleco de informoj prezentas riskon al kolektiva memoro. En la teatro, tiu ĉi risko ne ekzistas, ĉar ni ĉiam estas en dialogo kun la mortintoj, se prunti frazon de la germana poeto kaj dramverkisto Heiner Müller.

Kiam mi surscenigas dramon de la rusa dramverkisto Anton Ĉeĥov, kiel ekzemple *La Ĉeriza Ĝardeno*, mi laboras kun li. La fakto, ke la dramo okazas antaŭ fizike ĉeestanta publiko, kio estas la nepra kondiĉo por ke ekzistu teatro, signifas ke jam de la unua minuto, ni estas en la procezo de inventado de kolektiva memoro.

En miaj teatraĵoj, ĉiam ekzistas dialogo kun pasintaj eventoj, ĉu personaj aŭ historiaj, aŭ kun verko el la pasinteco, ĉu grekaj tragedioj aŭ dramoj de Ŝekspiro. Kiam mi verkis mian version de *Antonio kaj Kleopatro*, mi evidente ne klopodis por tion fari pli bone ol Ŝekspiro, sed dialogi kun li. Ĉiaokaze, mi komencas per materialo el la pasinteco, kiu produktas ion en la nuntempa realo. Ekde mia adolesko, eble mi faras teatron por ne esti sola. Kaj memoro estas tio, kio permesas al ni ĉiam esti akompanataj.

> **“La Festivalo de Avinjono festas nian kapablon kunveni ĉirkaŭ la scivolemo pri la alieco**

Ĉu oni povas diri, ke la demando pri memoro troviĝas ĉe la kerno de via laboro, ke ĝi iamaniere estas ĝia komuna interliga fadeno?

Fakte, mi ne faras teatron kun la celo apliki teorion aŭ doktrinon. Mi kunigas homojn, kun kiuj mi deziras pasigi tempon, ĉar mi admiras ilin, ĉar ili havas homajn kaj artistajn kvalitojn, kiuj igas min voli labori kun ili. Kutime, tre malfrue en la laborprocezo mi vere komprenas pri kio temas la dramo, kaj en kioma grado ĝi konservas spurojn de aliaj kreaĵoj. Mia aliro estas tre spontanea. Mi pensas pri la estetiko nur poste.

Ekzemple, kiam mi verkis *Kiel eble plej maleble* (*Dans la mesure de l'impossible*), dramon bazitan sur la atestoj de homoj, kiuj kunlaboras en la kampo de humanitara helpo, mi ne ekkonsciis ĝis la provludoj ke mi laboras per rakontado kaj elvokado. En tiu teatraĵo, mi ne montras, sed rakontas historiojn, kiujn aliaj spertis kaj rakontas. Sammaniere, en la



◥ *Tiago Rodrigues (meze) dum prezentado de* Parkere.

verko de Sofoklo, ni ne vidas Antigonon mortantan en la kavo, sed mesaĝiston, kiu emocie rakontas kio okazis. Mi estas multe influita de ĉi tiu teatra formo, kiu petas la spektantaron imagi kion oni ne povas aŭ ne volas montri.

Kiel direktoro de la Festivalo de Avinjono, vi decidis inviti malsaman lingvon ĉiujare. Kial vi faris tiun elekton?

Pro pluraj kialoj. La unua rilatas al la historio de ĉi tiu festivalo, kiu estis fondita en 1947 kaj fariĝis simbolo de la demokratiigo de kulturo en Francio. Tra la jardekoj, ĝi transformiĝis en preskaŭ mitan montrofenestron por la scenaj artoj, konatan en la tuta mondo. La deziron doni al ĉi tiu evento internacian amplekson ekhavis la fondinto de la festivalo, Jean Vilar, kiu ekde la 1960-aj jaroj strebis al inkludigo de artistoj el aliaj brancoj kaj kulturoj.

Post preskaŭ 80 jaroj da ekzistado, la festivalo ankoraŭ festas nian kapablon kunveni ĉirkaŭ la scivolemo pri la alieco. Ĉe la Festivalo de Avinjono, ni kuniĝas, ĉar ni estas malsamaj. Inviti lingvon estas maniero diri, ke ni rigardas la mondon ne tra la prismo de ĝiaj landlimoj kaj naciecoj, sed tra ĝiaj lingvoj, kun tre malferma perspektivo.

Kiam ni invitas la hispanan lingvon, ekzemple, kiel okazas en 2024, ni ankaŭ inkludigas prezentaĵojn en indiĝenaj latinamerikaj lingvoj, kelkaj el kiuj estas minacataj de formorto. Tio estas maniero rigardi la mondon tra ĝia diverseco kaj historia kompleksecо.

Ĉu tiu malferma aliro ne fariĝas pli kaj pli malfacile komunikebla?

Ajnaokaze, ĝi iĝas pli kaj pli vitala. Ni loĝas en kontinento, kie la politikaj kaj sociaj fortoj, kiuj pledas por la fermo kaj la izolado, estas potencaj. La arta kreado havas la povon konstrui pontojn inter malsamaj mondoj. En tiu aspekto, mi ne povas eviti projekcii min sur mian propran historion, tiun de familio kiu alvenis al Francio dum la diktaturo de Salazar pro politikaj kialoj.

Hodiaŭ, mi havas la privilegion reveni al ĉi tiu lando por enposteniĝi kiel direktoro de la Festivalo de Avinjono. Fakte, mi ŝuldas dankon al parto de la socio, kiu subtenas tiujn valorojn de akcepto kaj gastamo. Kaj mi havas la respondecon batali por tiuj valoroj. Malfermeco al aliaj kulturoj, al aliaj lingvoj kaj al aliaj manieroj rigardi la mondon estas esenca por nutri nin kaj ebligi al ni kune progresi.

Kiun rilaton vi havas kun via gepatra lingvo?

Amrilaton! Ju pli mi lernas aliajn lingvojn, des pli la portugala lingvo fariĝas esprimo de mia intima memo. Mi parolas angle, france kaj hispane kun certa flueco. Tiuj estas lingvoj kiujn mi sufiĉe regas por aktori sursceneje. Mi ankaŭ povas babiladi en aliaj lingvoj, kiel la itala. Sed kiam mi verkas teatraĵon, ĝi estas en la portugala, ĉar ĝi estas la sola lingvo kiu permesas al mi esti vere libera. La portugala estas la sola lingvo en kiu mi povas fari erarojn intence. Se mi faras eraron en la franca aŭ en la angla, tio estas eraro. Se mi eraras en la portugala, tio estas poezio.

Se vi devus elekti nur unu libron, kiun libron vi elektus?

La demando pri la fina, definitiva libro, estas tre malfacila. Kiam mi pensis pri libro por mia avino, mi konsideris liston de eblaj verkoj. Poste mi skribis al George Steiner, profesoro pri literaturo ĉe la Kembriĝa Universitato kaj grava erudiciulo. Mi neniam ricevis respondon, kaj fine mi elektis la Ŝekspirajn Sonetojn. Post kreado de *Parkere*, mi havis la ŝancon iri al Kembriĝo kaj renkonti lin.

Li fakte neniam ricevis mian leteron, ĉar li estis emerita de la Kembriĝa Universitato, kaj ĝi neniam atingis lin. Mi demandis lin, kion li dirus al mi, se li ĝin estus ricevinta. Pri la elekto de Ŝekspiro, li simple diris: 'Ne malbona'. Li aldonis, ke mi bonŝancis ne ricevi lian respondon, ĉar li estus dirinta al mi, ke ne ekzistas lasta libro, nur la sekva. Se mi vere devus elekti unu libron el ĉiuj, mi verŝajne devus fari teatraĵon por trovi la respondon. ■

-El la angla esperantigis Pablo León (Argentino)


Gina Doubleday
UNESKO

La efiko de milito sur scienca esplorado en Ukrainio

La kondiĉoj de scienca esplorado en Ukrainio tre malboniĝis depost la komenciĝo de la rusia invado en februaro 2022. Kiel rezulto de la bombado de ukrainaj urboj, pli ol unu triono de la sciencaj institucioj estis damaĝita aŭ detruita kaj pluraj ukrainaj sciencistoj estis mortigitaj. Multaj esploristoj kaj universitataj instruistoj estis enlande delokitaj kaj unu el tri nun devas fore labori. La buĝeto asignita al la scienca laboro reduktiĝis, kio kaŭzis perdojn en la salajroj de stabanoj, onigon de labortempo kaj suspendon de laborpostenoj. Sekve, la produktiveco en scienco spertis reduktiĝon.

Tiuj estas kelkaj el la konkludoj de studo de UNESKO publikigita en marto 2024 por signi la duan datrevenon de la milito. La studo liveris detalan *Analizon pri la milita damaĝo al la ukraina scienca sektoro kaj ĝiaj sekvoj* laŭlonge de la pasintaj du jaroj. UNESKO komisiis tiun studon al la Junulara Akademio de Sciencoj de Ukrainio kiel unuan ŝtupon en la disvolvo de urĝa restaŭra plano por la ukrainia publika scienca sektoro.

-El la angla esperantigis James Rezende Piton (Brazilo)





La Instituto pri Problemoj pri Sekureco de la Nukleaj Energi-produktejoj perdis nemalhaveblajn kontrolajn ekipaĵojn en la portempe okupaciita distrikto Ĉernobilo, inkluzive de laboratorio, kiu kontrolas la nivelon de radioaktiveco.

Tio reprezentas signifan minacon al la sekureco de 2 miliardoj da homoj vivantaj en Eŭropo, Nord-Afriko, Mezoriento kaj Centra Azio.

Sekvoj en konstruaĵoj kaj sciencaj ekipaĵoj

1 26 miliardoj da usonaj dolaroj estas necesaj

por refari la infrastrukturon,

de publika esplorado, inkluzive de 981 milionoj da usonaj dolaroj por universitatoj, kiuj faras 52% el la publike nancitaj esploroj

18 sciencaj instituticioj

en okupaciitaj teritorioj estis portempe delokitaj;

iuj faris esplorojn pri biodiverseco kaj ekologio, kiuj ne povas distance daŭri

317 millionoj da usonaj dolaroj

estas necesaj por restarigi la tri universitatojn plej difektitajn en bombadoj:


- Nacia Jura Universitato Jaroslav Mudrij (Ĥarkovo)
- Nacia Universitato O. M. Beketov de Urba Ekonomio (Ĥarkovo)
- Nacia Universitato Taras Ŝevĉenko (Kievo)



Enmigradaj cel-landoj por ukrainaj sciencistoj


(La dek plej multnombraj laŭ enmigrintaj ukrainaj sciencistoj, januaro 2024)

1. Germanio — 1 056
2. Pollando — 664
3. Britio — 169
4. Ĉeĥio — 168
5. Francio — 166
6. Usono — 134
7. Hispanio — 116
8. Aŭstrio — 100
9. Italio — 88
10. Svislando — 82



unesco

Bintou kaj Issa en la insulo Goreo




En ĉi tiu unua titolo de la bildlibroserio Bintou kaj Issa, la ĝemeloj, iliaj geavoj kaj plej proksimaj amikoj vizitas la insulon Goreo ĉe la marbordo de Senegalo, fronte al Dakaro.

Disvolvita kadre de la projekto *Itineroj de sklavaj popoloj* de UNESKO, ĉi tiu serio estas destinita por konsciigi junajn legantojn (5-9 jaraĝajn), en amuza kaj alirebla maniero, pri la historio de sklaveco kaj ĝiaj nuntempaj sekvoj.

UNESCO Publishing/Langages du Sud
978-92-3-100578-7
40 pp., 200 x 200 mm, mola kovrilo
8 eŭroj

Baldaŭ aperonta

Por pedagogoj, kio estas infana literaturo?



Infana literaturo tenas la vidon de infanoj kaj kondukas ilin kompreni la mondon, akiri vivspertojn kaj formi sanan personecon.

En la klasĉambro de la Instituto pri Psikologio kaj Eduk-sciencoj de Zaozhuang-a Universitato, instruisto klarigas al studentoj kiel laŭtlegi la verkojn de infana literaturo.

La akso de Pekino

La akso de Pekino estas la centra akso de la pekina urbo, konstruita antaŭ pli ol 600 jaroj, kun rekta distanco de proksimume 7.8 kilometroj. Kiel la plej bone konservata akso de tradiciaj ĉefurboj, la akso de Pekino prezentas la grandan talenton de la ĉina nacio en urboplanado kaj konstruado. Ĝi estas vivanta portanto de la ĉina kulturo kaj registras la mirindan memoron de la ĉina civilizacio.



Abonu *Kurieron*

UNESKO-Kuriero estas eldonita en la ses oficialaj lingvoj de UN, kaj ankaŭ en la kataluna kaj Esperanto.














Abonu la presitan version en ĉiu trimonato aŭ abonu 100% senpage la bitversion.

Malkovru niajn ofertaĵojn

http://www.espero.com.cn/; http://esperanto.china.org.cn;
https://www.chinaesperantoligo.com.cn/kuriero//

https://en.unesco.org/courier • https://fr.unesco.org/courier
https://es.unesco.org/courier • https://ru.unesco.org/courier • https://ar.unesco.org/courier • https://zh.unesco.org/courier



Ĵus publikigita



La tutmondaj geoparkoj de UNESKO
Kuneldonita kun Gestalten (angle)
ISBN 978-3-96704-088-3

ISSN 2096-9082
CN 10 - 1711/C